



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Novembro - Decembro 2010-a

6a jarkolekto nro 63-64

Enhavo

En nia patrujo la 2010a jaro, estas ankaŭ ERKEL-jaro.....	3
Ferenc Erkel	4
Operoj de Ferenc Erkel	9
Humoro	11
Sciindaĵoj pri la apopleksio	12
Johano Vajda: Post dudek jaroj.....	13
Novaĵo	14
Internacia Jaro de Chopin, en Hungario.....	15
Aŭtuna Foliaro	15
Historio de la Esperanto Movado en Miskolc 2009-2010	16
Prezento de la antologio <i>Aprezita Pasinto</i>	18
Ni funebras	19
Intermonda Invado	19
Hungarlandaj Ekskursoj	20
Füzér.....	20
Füzérradvány	20
Danco de Feinoj	21
Vizito en urbo Tiszafüred.....	23
Comenius-programo 2009/11 en urbeto Tiszafüred, Hungario	27
Hungara Fervojista Mondo	30
Ordiplomita geedza paro	31
Donaco de la reĝo.....	32
Templo kaj Klostro de Karmelanoj en Miskolc	33
La Monto Karmelo en Israelo	34
Pliaj leteroj el nia leterkesto	35
En la jaro 2010-a 20 jaras la muziko-grupo esperantista en la.....	36
Demokratia Kongo-Kinshasa	36
Rusio	37
Gratulo.....	38
Atenton!.....	38



Subfalis la foliaro, subfalis jam ankaŭ la pinglaro de - Silka pino de Koreo / Pinus koraiensis –. aŭ alinome: Blua pino de Koreo - en nia ĝardeno. Fotis: s-ino Adri Pásztor

En nia patrujo la 2010a jaro, estas ankaŭ ERKEL-jaro

Ni petas, bonvolu tutkore akcepti memkonfeson de sinjoro Károly Sziklavári, de profesoro /de la „Juhász Gyula” Instruiteduka Ĉeflernejo de urbo Szeged/ kaj lian publikokonigan prelegon pri la elstara figuro de la 19-jarcenta hungara muzika kulturo.

Sinjorino Adri Pásztor

„Mi okupiĝas kiel esploristo ĉefe pri la hungara muziko kaj kulturo de la 19-a kaj 20-a jarcentoj, elstare pri vivoverkoj de Francisko Liszt, Francisko Erkel, Adalberto Bartók kaj Ernesto Dohnányi. Mi konsideras tre grava la konatigon kaj prizorgadon de la hungara spirita heredaĵo de la du jarcentoj por larĝaj amasoj per ĉiuj eblaj manieroj. (Inkluzive malkovradojn de la multfoje malinde forgesitajn, aŭ kaŝite restitajn vivoverkojn, aŭ kreaĵojn.) Mi prelegadas, miaj skribaĵoj aperis en diversaj revuoj, esearoj.

El inter miaj iamaj instruistoj en Miskolc, mi taksas kiel mian majstron pli aĝan Franciskon Róczey; en Budapeŝto s-rinon Elizabeta Hegyi Legány, kies faka precizeco, estimo pri la tradicioj estas senprecedenca. Sed mi estus maljusta, se mi ne menciis ĉi-loke estrinon de miaj bazgradaj miŝkolcaj pianostudoj, s-rinon Tiborné Bacsa.

Mi vivas en Miskolc, – kvankam mi multfoje estas malproksime de la urbo – nuntempe mi instruas muzikteorion, solfeĝon, muzikhistorion kaj muzikliteraturon en Scienco-Universitato de Szeged.

Kun tutkora saluto:

Károly Sziklavári”

Ferenc Erkel

(1813 – 1893)



Skulptaĵo de Erkel en urbo Gyula (el Hungara Vikipedio)

La hungara kulturhistorio ne povas fieri pri alia fama muzikistfamilio krom la familio Erkel. Niaj konfuzaj rilatoj ne helpis daŭran, neĝenatan funkciadon de la muzikistgeneracioj. Niaj famaj muzikistoj amase forlasis nian landon tempe de historiaj turnopunktoj, aŭ nur ĝeneralaj cirkonstancoj. La familio Erkel (escepte de kelkaj membroj) restis en la patrujo kaj agadis aktive. Francisko Erkel estis centra personeco de nia muzika vivo en la 19-a jarcento – kaj laŭ ni kaj laŭ la iamaj samtempuloj. El inter liaj filoj Sándor (Aleksandro) Erkel (1846-1900) kaj la tre multflanka Gyula (Julio) Erkel (1841- 1909) havis gravajn rolojn por formi la hungaran muzikkulturon dum la fino de la 19-a jarcento. Elek (Aleksio) Erkel (1842-1893) estis ĥorusestro de la popolteatro kaj famiĝis kiel komponisto de la popolteatraĵ-muzikoj. La kvara muzikistfilo de Francisko Erkel estis László (Ladislao) Erkel (1844-1896), kiu unue komponis en urbo Gyula, poste iĝis en Pozsony (Bratislavo en la nuna Slovakio) dirigento kaj muzikpedagogo, kie fine de lia vivo iĝis instruisto por piano de la juna Béla (Adalberto) Bartók kaj tiel famigis sin en nia muzikhistorio.

Devenon de la familio kovras mallumo. De kie kaj kiam venis la familio Erkel al Hungario? Ĝis hodiaŭ oni ne sukcesis diveni tion. Tiel ŝajnas, ke la nederlanda, aŭ germanlanda deveno estas la plej verŝajna. Ĉeesto de la familio montreblas en Pozsony de la 15. jarcento. La tieaj prauloj faris multspecajn agadojn de la vitkulturado ĝis la komerco. Estis inter la prauloj multaj muzikistoj. Praavo de Francisko Erkel, Vilhelmo Erkel ĉirkaŭ jaro 1725 naskiĝis kaj estis muzikmajstro de klostro Notre Damo de Pozsony. Lia unuanaskita filo, pli aĝa Jozefo Erkel (1757-1830) same iĝis muzikisto kaj samkiel lia sola plenkreskaĝon atinganta filo: pli juna Jozefo Erkel (1787-1855). Aŭtoro de ĉi tiu artikolo sukcesis rigardi du, nun en privatkolektaĵo troveblajn kompoziciojn de pli aĝa Jozefo Erkel: la orkestron pretendantan Te Deum-on kaj la Veni sancte spiritus-on, kiuj pretiĝis supoze por uzi en Pozsony.

En la departemento Békés ekloĝanta, arton protektanta familio-Wenckheim invitis familion Erkel al urbo Gyula, efike de tio ili transloĝiĝis tien en 1807. Pri tio, ke pli juna Jozefo Erkel estis elstara muzikisto, atestas lia tiea multflanka agado: li estis kantoro, apud ĝi li organizis blovorkestron, kune kun sia patro kunlaboris dum la en kastelo aranĝitaj muzikaj teatraĵ prezentadoj, krom tio dommuzikis kiel unua violonisto de la loka arĉista kvaropo. Lia unua filo naskiĝis la 7-an de novembro 1810, kiu ne heredis baptonomon de sia patro (rompante la familian tradicion): lia baptopatro iĝis grafo Francisko Wenckheim, kiu estis amiko de la muzikistfamilio. Laŭ lia baptonomo la plej signifan, konstante en Hungario vivantan hungaran komponiston de la 19-a jarcento oni nomumis al Francisko Erkel. Apud li la tria filo, Jozefo Erkel (1813-1859) iĝis profesia muzikisto el inter la fratoj, kiu estis tenorulo, grava figuro de la frua hungara operludo. Li estis la sola Erkel-familiano, kiu kiel muzikisto funkciis ankaŭ eksterlande: dum la 1850-aj jaroj en kelkaj jaroj kantis en Hamburgo.

Dank'al siaj patro kaj avo Francisko Erkel povis akiri siajn unuajn muzikajn travivaĵojn en tia ĉirkaŭaĵo, kiu estis pli vigla kaj inspira, ol tiu de iamaj hungaraj etaj urboj. Kvankam li ne estis genia infano, tamen jam en juna aĝo povis fieri pro la rekonindaj prezentaĵoj: laŭ la loka tradicio en sia 10-a jaraĝo li orgenis en la templo, anstataŭinte sian patron. Li pianludis unue kiel pianisto publike en Gyula en sia 11-a jaraĝo. Li finis bazgradajn studojn en sia naskiĝurbo, liaj gimnaziaj jaroj ligiĝas unuparte al Nagyvárad (Oradea en nuna Rumanio), aliparte inter jaroj 1822-1825 al Pozsony. Henrik Klein (1756-1832) direktis lian

muzikinstruadon, kiu direktis muzikinstruadon de liaj patro kaj avo. Henrik Klein havis personan kontakton kun Beethoven, pro tio verŝajne ne estas hazardo, ke ĉefa komponista idealo de Ferenc Erkel iĝis la malfrua klasika viena majstro. Efiko de komponaĵoj de Beethoven daŭris dum jardekoj por Erkel. Sen tiuj preskaŭ estintus neebla la heroika baztono de la *Maria Bátor*, aŭ *László Hunyadi*. Efiko de Beethoven sentiĝas ĉe muziko de *Baŭno Bánk*: ĉefe ĉe duo de Bánk kaj Gertrud. La unua komponaĵo de Erkel pretiĝis en Pozsony. kiun ni konas: per orkestro akompanata perdiĝinta Litanio.

Fine de 1827, aŭ komence de 1828 Erkel transloĝiĝis al Kolozsvár (Cluj, en nuna Rumanio). Post germanaj efikoj de Pozsony „en ĉefurbo de Transilvanio” la hungaraj kulturaj impulsoj iĝis determinaj por la juna muzikisto, kiu disvolvis unue spektakle sian talenton. Li famiĝis kiel pianisto. Li komponis virtuoze kaj efike hungarajn stilajn komponaĵojn. (*Hungaraj variaĵoj*, *Hungara fantazio*, *Hungaraj fantazioj*: bedaŭrinde nuntempe jam ili ne ekzistas) Li direktis orkestron kaj tiel ŝajnas, ke akiris praktikon por direkti operon. Li ligis amikecon kun Samuelo Brassai (1797-1897), la lasta transilvania poliscienculo.

En 1834 li forlasis setlejon Kolozsvár kaj laŭ la tiamaj informoj iris al Szemeréd kaj iĝis muzikinstruisto ĉe familioj de grafoj. La tien veturadon rompinte, la 4-an de majo li donis koncerton en Peŝto: publiko de la urbo okaze de tiu povis aŭskulti unue lian pianludon. Lia sorto estintus izoliteco delonge – kiel sortoj de liaj rangaj, enlandaj muzikist-antaŭuloj komence de la 19. jarcento kaj ankaŭ sorto de Mikelo Mosonyi en la 1930-aj – en 1940-aj jaroj -, se vento de la tempoj ne porparolas. Nome en 1835 li jam povis partopreni aktive muzikvivon de Peŝto-Buda, kie direktis unufoje operspektaklon la 11-an de aprilo 1835: *Frizisto de Sevilla* de Rossini en fortikaĵteatro en Buda antaŭe de la denove novformiĝanta hungara teatra trupo. Samjare (1-an de novembro) li pianludis en Peŝto e-minoran piankonĉerton de Chopin: pro tio hungaria prezentado de la komponaĵo ligiĝas al lia nomo. Determina estas lia plurjardeka muzikinterpretista agado de la 19-a jarcenta patruja historio de la pianludo. Indan rekonon de lia kariero estis, kiam li iĝis direktoro kaj pianinstruisto de la en 1875 malfermita Konservatorio. Restis al ni liaj pli ampleksaj ĉambromuzikaj kaj komponaĵoj por piano: laŭ temo de *Duo Brillant* de Antonio Csermák estiĝinta vario-serio (1837: ĝi aperis en kunaŭtoreco de Henri Viceuxtemps, belga violonisto, ĉe la eldonejo Shott de Mainz, kiel unua presita komponaĵo de Erkel). *Intruduction und Capriccio* (du transkomponaĵoj de Heinrich W. Ernst, 1840.); la variaĵoj je soldatvarba muziko de opero *Artifiko* de Andreo Bartay (1839) apartenas al la plej valoraj eroj de la hungara instrumenta muziko de la reformepoko. Aŭtora kaj muzikinterpretista agado, kiel ĉe la romantikaj samtempuloj, ankaŭ ĉe li strikte ligiĝis ankoraŭ en tiuj – la unuan kreantan periodon fermantaj, fantaziecaj aŭ variecaj, la virtuozaĵoj – instrumentaj komponaĵoj. Lia plej signifa komponaĵo por piano estas la ”Artifiko”-varioj, kiu montras efikon de *bel canto* – de Chopin. Pluse same sprite li interpretas en ĝi la karakteran sonan mondon de la opermuziko al lingvo de la piano. Tiun faris en multaj komponaĵoj la samaĝa, internacian karieron havanta pianopoeto. Ĉio ĉi, tiel ŝajnas, ne estas hazarda: la rekta inspiranto de la kolorpompa, sprita komponaĵo estis la Op.2. de Chopin (komponita laŭ la *Là ci darem la mano de Don Giovanni* de Mozart) piano –orkestra varia serio. Unuigo de la eŭropaj modeloj kaj hungaraj temoj en la Artifiko-varioj estas frua ekzemplo de tiu determina dueco, kiu karakterizis la tutan vivoverkon, kvankam ne ĉiam, sed preskaŭ ĝisfine.

Pro la malbonstato de la fortikaĵteatro printempe de 1836 la juna muzikisto estis vicdiligento de la urba teatro de Peŝto. Ĝis fino de 1837 li estis ĉe la german-lingva teatra trupo. Poste en aŭgusto malfermiĝis Hungara Teatro de Peŝto (ekde 1840: Nacia teatro). Unue li estis inspektoro de la opera sekcio, poste la 15-an de januaro 1838 iĝis unua dirigento. La konstruaĵo poste – kiel la plej ĉefa sanktejo de la patruja kulturo dum la dua parto de la jarcento fariĝis plej efika disvolvigo de kreantarto de Erkel: oni prezentis tie liajn operojn (escepte de *Stefano, la reĝo*), la *Himnon* kaj multe da ceteraj komponaĵoj.

Li proksimiĝis de paŝo al paŝo al la komponado de la opero. En la 1830-aj jaroj li komponis lian teatraĵmuzikon (*Boatisto de Venecio* – perdiĝis) kaj etajn scenejajn komponaĵojn devenantajn el la sama jarcento. Poste sekviĝis la instrumentado de opero „*Ĵuro*” de Saverio Mercadante, ĉar en la teatro ne estis partituro. La instrumentado tre ege multe helpis lin por komponi unuan operon de Erkel: *Maria Bátor*, kies libreton laŭ dramo de Andreo Dugonics skribis Béni Egressy (1814-1851). Béni Egressy estis la plej signifa libretoaŭtoro de Erkel, kiu estis ne anstataŭigebla post sia forpaso. Erkel per *Maria Bátor* de la junan hungaran nacian muzikarton altigis al eŭropa rango. (tiu kreaĵo konstatablas kiel eksterordinara komponista laborprodukto.) Ankaŭ la sama tempo estas simbola: la nomo de instituto „Nacia Teatro” unue ekaperas sur presaĵoj de *Maria Bátor*, kiuj montras tempopunkton de ĝia premiero: la 8-an de aŭgusto 1840. El muzika vidpunkto la komponaĵo parolas internacian operlingvon de la epoko (itala, franca, germana), sed ties melodio-mondo jam estas hungardevena. Ĉi tio signas ĉefe ekaperon de la ĉardaŝkarakterata danĉmelodio, kiu evoluis el la soldatvarba muzika stilo. La ofte heroan voĉon havanta hungara popoltavolo ĉefe grupiĝas ĉirkaŭ la heroinon kaj ŝian paron, princon Stefano, esprimante la naturecon kaj klarecon: la soldatvarba muziko ankaŭ de ĝiaj estantaj ecoj („noblo-pozo”, patosa tono) estos peranto de kolektivaj idealoj sublimate anoncenthavo en strukturo de la opero.

La 1844-an jaron ni povas rigardi al malfrua junaĝa karpinto de Erkel: la 27-an de januaro estis prezentado de *Ladislao Hunyadi*, printempe estiĝis muziko de la *Himno*. La kreantan paletron riĉigis serio de muzikoj por la nova – ĉefe de Ede Szigligeti kreita – teatra artospeco: *la popolteatraĵoj*. Erkel-muziko pretiĝis al tri popolteatraĵoj de Ede Szigligeti (*Du pistoloj*, *La judo*, *Debrecena fripono*), al diversaj artospecaj verkoj de Francisko Ney kaj Paŭlo Kovács (*La aventuristo*, *Leŭtenanto de nobluloj*). Ni konas ankaŭ unu mallongan ĥorokreaĵon (*Rondokanto de Rondo*), kiun li komponis tiutempe por la Nacia Rondo.

Libreton de *Ladislao Hunyadi* kreis Béni Egressy laŭ konkursa laŭreata dramo (1839) de Lőrinc Tóth. Dua opero de Erkel iĝis la plej sukcesa kaj el publikviva vidpunkto plej grava hungara muzika teatraĵo de la reformepoko. Ĝi havis blindigan sukceson, pruvante, ke *mem la nacio* multĉion povas ricevi de la nacia arto samtempe por eterne rompante la ne sensignifajn, iamajn kontraŭstarojn. La nacia tragedio de ĝia temo iĝis inspiranto de multaj eminentaj kreaĵoj en la 19-a jarcento. Ĝian baztonon traigas la atmosfero de la al revolucio iranta jardeko, en kiu jardeko ĝi estiĝis. Muziko de Erkel influis la samtempulojn baze de heroa soleneco de la nacia voĉo: plej belaj partoj de la *Ladislao Hunyadi* havas ĉefe soldatvarbajn kantajn radikojn. Kiel novaĵo kelkloke en la *Maria Bátor*..., sed jam tipe ekde la *Ladislao Hunyadi*, ke li ekrompis fermecon de la tradiciaj soldatvarbaj kantoj kaj kreis „libere spirantajn” hungarajn artefaritmuzikajn formojn. (Laŭ vortoj de Bence Szabolcsi.) Al ĉi tiu apartenas ankaŭ la tn. *Cignokanto*, kiu havas tri partojn antaŭ la karcersceno de *Hunyadi*...: elstara muzika enhavo de la heroa tragiko, kio estas rerigardo pri la vivo de la heroo staranta antaŭ sia sorto. Pluse ankaŭ la patosa-patriota idea enhavo fortiĝis ekde la *Maria Bátor*. Ĉi tiel iĝis la ĥoruso *Mortis la insidulo* en 1848 aktualpolitika (Metternich-on adiaŭiganta) amaskanto. El la detaloj de la opero, (verŝajne de Ferenc Doppler) komponitan *marŝon-Hunyadi* tempe de la liberecbatalo kaj ankaŭ post tio la soldatorkestroj dum tagoj muzikis. La en 1845 pretiĝinta *operuverturo* ankaŭ mem estas komponista klasikaĵo. Erkel plenigis modajn formokadrojn de la itala operuverturo per hungara muzika materialo. Kiel memstara orkestraĵo iĝis ne delonge populara ankaŭ eksterlande.

Andreo Bartay (1799-1854), la Nacian Teatron unue arte prosperiganta, larĝan horizonton havanta direktoro anoncis konkurson por muzikigi *Himnon* de Ferenc Kölcsey. La poentuma komitato prijuĝis unuvoĉe por Erkel la unuan premion. Laŭ ĝia motivo la komponaĵo, „krom tio, ke plej bone proksimigas la hungaran karakteron kaj ideon de la poemo, plej feliĉe unuigas la melodisimplecon kaj la himnan solenecon. En *Himno* de Erkel denove de Okcidento kaj Oriento kontaktiĝas unu al alia: nome la tradiciaj eŭropaj artospeciodeloj

kaj soldatvarbaj kantaj impulsoj miksiĝas-kontaktiĝas unu al alia bone perceptebla. Ankaŭ inter miniaturaj formaj kadroj estiĝas tiu sintezo, kion havas cetere komponaĵo de la komponisto (inkluzive liajn preskaŭ ĉiujn operojn). Publiko de la Nacia Teatro akceptis *Himnon* de Erkel okaze de la prezentado la 2-an de julio 1844 „kun vigla aplaŭdo kaj kontenteco”. Oni eldonis unue en sama jaro, dediĉante al Francisko Deák. Andreo Bartay en la antaŭa jaro anoncis konkurson por muzikigi *Proklamon* de Mikaelo Vörösmarty, ties premiita iĝis Béni Egressy. Erkel ne povis partopreni tiun konkurson, ĉar estis membro de la kritikanta komitato, sed en majo de 1843 ankaŭ li pretis kaj prezentis sian *Proklamon*.

En 1845-1846 Erkel-muziko naskiĝis al pli novaj verkoj de Szigligeti. (*La malliberulo*, *Sekreto de ŝranko*). Ambaŭ du (kaj la pli frua *Du pistoloj*) atingis daŭran sukceson. Al pretendoj de la epoko taŭgas, al grandaj homamasoj estas parolanta, estas kun pri aktualdemandoj okupiĝanta „trapolitikata” artospecio helpis kreskon de kreanta renomo de Erkel: liaj popolteatraĵmuzikoj pli frue iĝis konataj tutlande, ol liaj operoj.

Post la malvenko de la liberecbatalo malpli iĝis la novaj komponaĵoj: ĝi havis multe da kialoj, inkluzive morton de lia iama libretisto Béni Egressy. Lia dirigenta agado abundiĝis meze de la jarcento: En 1853 li entreprenis ĉefan rolon en fondo de Filharmonia Societo, kies dirigento iĝis. Poste en 1868 oni elektis Franciskon Erkel al landa dirigento de la disvolviĝantan virhormovadon kunordiganta Landa Hungara Kantarasocio. Kontentigante sian oficialan devigon li komponis salutantan kanton por imperiestro Jozefo Ferenc (1853), poste okaze de memorinda – por multuloj historisnifa – hungaria vizito de imperiestrino Elizabeta (1857), Erkel komponis operon kune kun la fratoj Doppler. Kara paralelo estas la sameco inter la populara, bonema Sankta Elizabeta de domo de Árpád kaj la nomo de imperiestrino. (La pli lasta ne povintus ricevi pli grandaniman artan akceptigon kiel membro de la gregantoj.) Sed la muzikrezulto iĝis pli multe ol de la porokazo. Dua akto de la de Erkel komponita *Elizabeta* estas solece festa, tamen reprezentas eksterordinaran koloron kun sia intima liriko. Ni povas rigardi tion al eta juvelŝtono de la romantika hungara opera tutproduktaro. Kiel aldoniĝo ankaŭ la *Himno* eksonis en akto de Erkel. La „*Elizabeta*” ankaŭ el alia vidpunkto estas grava stacio de la vivoverko: en ĝi tia, de Erkel komponita opermelodio ricevis lokon, kiu montras efikon de la 19. jarcenta hungara popola kantoliteraturo. Kiel daŭrigo sekviĝis iu posta inserto de Ladislao Hunyadi el 1859, poste pluraj detaloj de *baŭno Bánk* – ke iĝu pli emfaza la rolo de la popoleca kanto kaj estu ankaŭ reganta kaze de la *Sennomaj herooj*. (Inter la trispecaj patrujaj tradiciotavolo: la soldatvarba kanto, ĉardaŝo kaj popoleca kanto „klasikan” ekvilibrigon reprezentas la muzika mondo de Tibisko-borda sceno de *baŭno Bánk*. Pri *baŭno Bánk* de Jozefo Katona kiel pri nacia dramo ni povas paroli fakte nur ekde 1845: ĝiaj prezentadoj faris serion en la Nacia Teatro ĝis fino de la liberecbatalo. En 1839 estis prezentata samloke. Ĝia efiko tiam montriĝis nur ĉefe en literatura produktaĵo de la sekva jardeko. La gazetaro unufoje en 1844 informas pri *baŭno Bánk*-operplanoj de Erkel. Pro tio ĝi okupis sian indan lokon en la publikpensado. Por formi tion al opero ankoraŭ estis malfrua reformepoka penso, sed Erkel – ĉefe pro morto de Egressy kaj pro ankaŭ aliaj cirkonstancoj – blokiĝis en la komponado komence de la 1850-aj jaroj kaj nur en 1860 finis tion grandparte. La 9-an de marto 1861 okazis la prezentado en tempoperiodo de la Solferino-posta publikviva ekflamado: kiel esprimo de sentomondo de la tuta nacio, meze de neniam viditaj hungaraj persukcesoj. La patrujajn radikojn havanta muzika popoltavolo unuiĝas en grandioza sintezo kun la tradiciaj italaj-francaj operaj elementoj en partituro de ĉefverko de Erkel: en siaj kelkaj komponaĵoj kelkfoje aperas fono de Donizetti kaj fono de Meyerbeer, sed samtempe aperas ankaŭ inspiro de voĉo de la juna Verdi.

En la sekva jaro prezentita *Ŝarolta* estis sensukcesa kaj ne hazarde la farsa opero ne estis mondo de Erkel (la subnivela libreto malhelpis la komponiston por pruvi ĝian kontraŭon.) Sed tiu verko – supoze kiel efiko de *Bela Helinjo* de Mosonyi -, estas atentinda eksperimento por krei preskaŭ tute hungaran muzikon havantan operon. Verajn novajn dimensiojn la *Georgo*

Dózsa vivigis en la vivoverko kiel granda opero – kiun ni povas rigardi kiel unua historia hungara politika grandopero, sed ankaŭ kiel popoldramo-eksperimento, kiu estas ankaŭ senkonscie orient-eŭropa kaj realista, grandpretenda kaj grandforta. (Kiel taksis la diversaj jardekoj.) Ĝia posteulo iĝis la *Georgo Brankovics*. Komponista kariero de Erkel en tiu du verkoj iradis plu kuraĝe eksperimente, sed influante de eksteraj efikoj, sed decidite arte suverenece. Liaj rezultoj estas atentindaj ankaŭ el tuteŭropa vidpunkto. Kaj estis jam laŭleĝa konsekvenco, ke liaj sekvaj operoj jam ne havis samajn sukcesojn, kiel la *Hunyadi* aŭ la *baŭno Bánk*.

La laŭ dramo de Jókai estiĝintan (Szigligeti-) libreton muzikigan *Georgo Dózsa* prezentiĝis en 1867, en jaro de Hungaria Kompromiso. Tiu tempo – oni povas diri – estis la plej ne taŭga momento por la verko, pro tio oni deprenis de la programo. Ĝian malsukceson kaŭzis ĝia temo – bedaŭrinde ne nur dum la Kompromiso, sed ankaŭ post cent jaroj. Sed ĉar la *Dózsa...* estis unu pinto de la vivoverko, pro tio la longa neglektigo estis perdo de la tiama hungara operludo. Kaj estas deprimanta fakto, ke ankaŭ la pli grandan sukceson havantan *Brankovics*-on oni mutigis pro la politika rilatigebleco: la Monarkio havis amikan eksteran politikon pri la Turkoj. Libreto de *Dózsa...* baziĝas sur la ŝokanta kaj en dua duono de la 19-a jarcento prezentita historia dramo. Ĝia agado okazas en epoko de Hunyadi – laŭ Deziderio Legány *Hunyadi-nostalgio* traigas la verkon -, kaj ankaŭ la planita (ĝisduone pretiĝinta) opero Simon Kemény / laŭ libreto de Jókai/ tiel ŝajnas kvazaŭ okazintus en sama epoko. Ĉiam pli bone estas atentebla, ke la maljuniĝanta Erkel sopiras al „perdita Paradizo” de sia junaĝo. Komence de sia kariero li estis aktiva, en intereso de noblaj agoj ĉiam por agi preta reformepoka individuo. Ĉi tiun nacian konscion li gardis en si mem ĝisfine kune kun la memoroj de la revolucio kaj liberecbatalo. Pro tio li ne povis akcepti la Kompromison, pro tio li sentis sin fremda de mezo de la 1860-aj jaroj.

En *Dózsa...*, en *Brankovics---*, en *Sennomaj herooj* enestas ideaelco kaj heroa tono de la liberecbatalo. La pli lasta jam citas tagojn de la liberecbatalo inter kadroj de farsa opero, sed vuale, dormebrie, aminde. En la historion – kiu komenciĝas kun humura-idila-vilaĝa bildo – miksiĝas nostalgia patrujdefendanta romantiko kaj nekovrita bongusta populismo, kuniĝante kun artaspeca naiveco. La *Sennomaj herooj* estis eksperimento de Erkel por krei veran popolvoĉan operon: el muzika vidpunkto tiu verko iĝis apoteozo de la popola hungara kanto/ sed el idea koncepto iĝis apoteozo de la liberecbatalo. Ĝia prezentado estis la 30-an de novembro 1880, kion direktis Aleksandro Erkel, kiel poste ankaŭ la *reĝo Stefano*-n.

La *nostalgio* povas esti ŝlosilvorto de la malfrua arto de Erkel. Tiu vorto fortiĝas en la *Dózsa...* kaj en siaj verkoj kaj la maljuna Erkel turnis sin al la estinto, rememoras kaj konstante revadas pri tempo de sia junaĝo, kio enhavis fortostreĉojn. Li citas ĉiam memorbildojn de la hungara patrujo en lia nostalgi-voĉaj lastaj komponaĵoj. Ĉi tion karakterizas la en j.1890 kreata aldo-piano-komponaĵo, kio estas historio pri estiĝaj cirkonstancoj de la *Hungara Albumfolio*: laŭ vortoj de Ludoviko Érdy „la ideo de la eta verko” estiĝis en Erkel, dume li restadis en sia ĝardeno rigardanta al Margareta insulo de Danubo. „Erkel pensis pri iu „sola boatanto kaj stela nokto kaj malnovaj hungaraj tempoj”. Laŭ tiu temo li komponis samjare (same aldo-piano) varioserion, kio restis nefinite, sed ankaŭ tiel estas eksterordinara komponaĵo: la memoranta 80-jara majstro komponis plej bonan ĉambromuzikan komponaĵon de sia vivo. Ĉi tiel li reatingis, ke povas enkadrigi sian vivoverkon. Ĝi estas malofta donaco!


Karlo Sziklavári

Operoj de Ferenc Erkel

Maria Bátor, opero en 2 aktoj, libreto de Béni Egressy (laŭ dramo de Andreo Dugonics), prezentado: 1840.



La kovrilpaĝo de scenarlibreto de opero Maria Bátor



La unua interna paĝo de la scenarlibreto de opero Maria Bátor de Ferenc Erkel. La bildo montras la hungaran reĝon Kolomano Könyves.

Ladislao /László/ Hunyadi, opero en 4 aktoj, libreto de Béni Egressy, (laŭ dramo de Lőrinc Tóth), prezentado: 1844.



Elizabeta, dua akto de la opero (la 1-an akton faris Francisko Doppler, la 3-an akton faris Karlo Doppler.) Libreto de Jozefo Czanyuga, prezentado: 1857. (okaze de unua hungaria vizito de imperiestrino Elizabeta.)

Baŭno Bánk, opero en 3 aktoj, libreto de Béni Egressy (laŭ dramo de Jozefo Katona), prezentado: 1861.




Ŝarolta, farsa opero en 3 aktoj, libreto de Jozefo Czanyuga, prezentado: 1862.

Georgo Dózsa, opero en 5 aktoj, libreto de Ede Szigligeti, laŭ dramo de Maŭrico Jókai, prezentado: 1867.

Georgo Brankovics, opero en 4 aktoj, libreto de Lehel Ódry kaj Francisko Ormai (laŭ dramo de Karlo Obernyik), prezentado: 1874.

Sennomaj herooj, opero en 4 aktoj, libreto de Ede Tóth, prezentado: 1880.

Reĝo Stefano, opero en 4 aktoj, libreto de Georgo Molnár kaj Antonio Váradi (laŭ dramo de Ludoviko Dobsa), prezentado: 1885 (originale estis planite pli frue unu jaro, okaze de malfermo de la Operdomo.)



La bildo montras la kovrilpaĝon de la scenarlibreto de Reĝo Stefano, opero de Ferenc Erkel.

Ŝimon Kemény, skizoj al unu planita triakta opero, libreto de Maŭrico Jókai fine de 1881-a jardeko – komence de 1890-a jardeko.

Karlo Sziklavári



La bildojn de la ekspozicio pri Ferenc Erkel, en la Miŝkolca Biblioteko „Ferenc Rákóczi IIa” permesite de la direktorino, fotis: sinjorino Adri Pásztor

Humoro

La ĝusta konvinko

Blondulino sidiĝas en la flugmaŝino. La stevardino iras al ŝi kaj diras: „Ĉi tio estas la unua sekcio. Vi devas sidiĝi ĉe la dua sekcio. Via bileto validas tie.” La blondulino respondas: „Mi estas blonda kaj bela, mi veturas al Aŭstralio, mi restas ĉi tie.” La stevardino iras al la pilotejo kaj diras, ke la blondulino ne volas sidi ĉe la dua sekcio. La vicpiloto diras: „Nu, mi priparolas kun ŝi.” Li iras al la blondulino kaj diras: „Kara damo, via bileto validas ĉe la dua sekcio. Vi devas sidiĝi tie, ĉar ĉi tie estas la unua sekcio.” La blondulino respondas: „Mi estas blonda, bela, veturas al Aŭstralio, mi restas ĉi tie.” La vicpiloto iras al la piloto, diras la paroladon kun la blondulino. Tion diras la piloto: „Nu, mi parolas kun ŝi, ankaŭ mia edzino estas blonda, mi konas la parolmanieron kun la blondulinoj.” La piloto iras al la blondulino, frustras ion en oreton de la blondulino. La blondulino tuj ekstaras kaj sidiĝas ĉe la dua sekcio. La stevardino kaj la vicpiloto nur gapas. La piloto klarigas: „Mi diris tion, ke la unua sekcio ne al Aŭstralio flugas.”

Garantiaĵo de kredito

Samuelo iras al la Banko de Israelo. „Bonan tagon, Samuelo!” –salutis lin estimplene dungito de la banko. „Bonan tagon! Mi petas unu dolaron da kredito” „Ĉu unu dolaron?? Samuelo, ja tion ni povas subtrahi de via konto sen problemoj.” „Ne, mi petas unu dolaron de kredito, kion mi repagas dum unu monato. Se mi ne ricevas ĉi tiun krediton, tiam ĉesigas miajn ĉiujn kurantajn kontojn ĉe via banko, mi forportas miajn ĉiujn juvelojn kaj ĉesigas la kontaktojn kun vi.” „Samuelo, ĉio estas en ordo, ni donas tiun krediton. Ĉi tie estas la subskribendaj dokumentoj.” „Kiom da interezo estas?” „3% /monato.” „Estas en ordo, sed mi volas lasi ĉi

tie mian aŭtomobilon BMW kiel garantion.” „Ne, Samuelo, tio ne necesas. Viaj kurantaj kontoj estas sufiĉaj kiel garantio.” „Se vi ne akceptas mian aŭtomobilon kiel garantio, tiam mi ĉesigas miajn ĉiujn kurantajn kontojn ĉe via banko kaj forportas mian tutan enhavaĵon, juvelon.” „ Estas en ordo, Samuelo, vi povas lasi vian aŭtomobilon en la subteretaĝa parkumejo de la banko kiel garantion ĝis 30 tagoj.” „ Tio estas perfekta!”

Samuelo hejmeniras kaj perĝoje diras al sia edzino: „Sara, Sara! Ni povos somerumi nun jam trankvile! Mi sukcesis akiri unu parkumejon por 0,03 dolaro pomonate!

Esperantigis László Pásztor

Sciindaĵoj pri la apopleksio

Sendu plu ĉi sciindaĵon por esti sanaj tiuj, kiuj gravas por vi! Ni povas savi vivon, se rekonas simptomojn de la hemoragio cerba. Ĉi tiu letero ne volas amuzi, sed ties direndo estas ege esenca.

Pro tio mi petas vin, bonvolu legi atenteme tiun kaj bone encerbigu la sekvan kazon.

Dum iu aŭdienco okazis, dume iu virino prenante en mano teleron, ŝanceliĝis kaj faliĝis. Oni helpis ŝin stari, poste la virino diris, ke ĉio estas en ordo, tiel ŝajnas, ke nur mi stumblis.

Ŝi ne volis voki kuraciston. Ŝi bone fartis sin inter la gastoj post la kazo. Dume ili atingis hejmen kun sia edzo, la edzo tamen vokis la ambulancan. La virinon oni portis en la hospitalon. Ne delonge samnakte la virino mortis pro hemoragio cerba. Se tie, sur loko de la amuzo iu rekonintus simptomojn de la hemoragio cerba, tiu havintus vivsavantan signifon dum la postkazaj tri horoj laŭ la opinioj de iu kuracisto. Ĝustadire estas kvar eblecoj por rekoni signon de la hemoragio cerba:

1. Se ni petas la danĝerigitan personon por rideti.
2. Se ni petas la danĝerigitan personon por diri iun simplan frazon, ekz. „hodiaŭ estas tre bela vetero.”
3. Se mi petas la danĝerigitan personon por levi ambaŭ brakojn alten.
4. Se ni petas la danĝerigitan personon por elŝovi la langon.

El inter la menciitoj kio ajn povas diversiĝi de la normalo, ekz.

- * unu flanko de la vizaĝo restas senmova spasme, aŭ
- * la malsanulo ne kapablas diri la simplan frazon, aŭ
- * la malsanulo iun manon ne povas levi alten, aŭ
- * la malsanulo ne kapablas elŝovi langon, aŭ
- * la lango elpendas el la buŝo, tiuj kaze voku la ambulancojn urĝe.

Tiu neŭrologo atentigis ankaŭ pri tio, se tiu ĉi letero atingas almenaŭ cent adresojn, tiam preskaŭ estas certa, ke ni povos savi almenaŭ unun vivo. Ankaŭ mi sendas plu ĉi tekston por savi vivon.

/La senditan hungarlingvan tekston de doktorino Helena Bikszádi, esperantigis L. Pásztor/

Johano Vajda: Post dudek jaroj

/ Vajda János Húsz év múlva/

Kiel sur Montblanc la glacio
spitanta al la sun', al vent',
jam mia koro sen pasio,
sen brul' ripozas en silent'.

Jen vetbrilantaj stel-legioj
koketas supre sur ciel',
min super ŝutas per radioj:
mi restas frosta sen degel'.

Kelkfoje tamen, dum mallumo,
en revoj de duona dorm',
sur fea lag' de l' fora junco
aperas via cigna form'.

Kaj mia kor' nun ekfajreras,
simile al la Monto kun
eterna neĝo, se aperas
la transe leviĝanta sun'.

/Esperantigis d-ro Kálmán Kalocsay/Sendis: s-ino Anna Marosvölgyi, OIK Budapeŝto/



Mont Blanc - Pinto perdiĝinta nebulon. Fotis s-ino Adri Pásztor, la 7an de julio 2009

Novajo

KEVA: Konga Esperanta Virina Asocio



Meze estas videbla la prezidantino de KEVA

/Foton sendis s-ro Germain Pirlot - Belgio/

La celo de la nuna prezento estas motivi, mobilizi kaj klarigi la ĉefajn celojn de KEVA :

- Lukti aŭ batali kontraŭ :

. Aidoso kaj aliaj seksaj malsanoj (MST)

. Perfortoj faritaj ĉe virinoj kaj infanoj

. Needukado de virino kaj infano

. Malpaca mondo kaj la malsato

Aliaj celoj estas:

Prizorgi orfojn kaj vidvinojn - Eduki virinojn, infanojn, orfojn kaj vidvinojn - Konatigi la internacian lingvon Esperanto al la virinoj - Efektivigi agrikulturan kaj bredadajn projektojn - Promuvi virinan sporton - Havi orfejon kun eduka centro kaj sana centro de KEVA...” – mi legis en la letero de la prezidantino fraŭlino Nelly Masemi – kiu skribis en sia alia letero, ke ili solaj ne povas funkcii, tial atendas la subtenojn de la geesperantistoj de la mondo.

Ilia retadreso estas: Konga esperanta virina asocio Keva
kevakongaesperantavirinaasocio@yahoo.fr

/La prezenton faris: s-ino Adri Pásztor laŭ informoj de s-ino Nelly Masemi kaj s-ro Germain Pirlot/

Internacia Jaro de Chopin, en Hungario



(Vikipedio hungara)

Fryderyk Franciszek Chopin. / kelkfoje en sia pola korespondado estas uzite ankaŭ Szopen/ (1810-1849) estas fama pola pianartisto kaj komponisto. Okaze de lia eksterlanda studvojaĝo pianludis en Vieno en 1829 publike. Post malvenko de la 1830-a jara pola revolucio li ne reiris sian patrujon. En 1831 li enloĝis en Parizo. Li flegis la amikecon kun Francisko Liszt, Berlioz, Heine, Balzac.... Sed la plej intimaj amikoj de sia animo estis tiuj al Parizo rifuĝintaj patriotoj, liaj sampatrujanoj, kiuj partoprenis en la malvenkita pola revolucio, ekz. ankaŭ Miczkiewicz, la poeto. Li ĉefe instruis, malofte koncertis. Li ĉefe komponis komponaĵojn por piano. Li estis iu renoviginto de la romantika muziko. Ni sentas el siaj komponaĵoj lian amon pri sia patrujo kaj pri popola muziko de sia patrujo. Oni aranĝas ekde 1927 en Varsovio, en Krakovo kaj ankaŭ alie piankoncertojn je lia memoro.

Gregorio Bogányi – ĉiuj komponaĵoj de Chopin

/27 novembro 2010. de la 10.a horo ĝis la 22-a horo/.

Tiel ŝajnas, ke la plej eksterordinara muzika delikataĵo de la Internacia Jaro de Chopin estos la dutaga Chopin-maratono de la elstara pianartisto. Ĉi tio estas senprecedenca entrepreno en historio de la „Bartók Béla” Nacia Koncertejo. Pli frue neniu neniam havis ideon por pianludi piankomponaĵojn de la romantika pola komponistgenio nur dum tagoj. La Kossuth,-kaj Liszt-premia pianartisto prezentis dense en dek muzikajn blokojn dum kelkaj horoj tutan dumvivan komponaĵaron de Chopin, multflanke kaj riĉenhave..

La hungaran tekston de Geogle: www.chopin.hu - esperantigis: László Pásztor

Julio Baghy

Aŭtuna Foliaro

Foliaro, firme danca,
en koloroj centnuanca,
prujnmordite ventpelate
ŝvebas ĉie: kampe, strate,
jen kuniĝas, jen dissaltas,
tie sinkas, tie haltas
por susuri, sible plendi,
jen funebre por silenti,
poste supren, ek pro blovo,
sed sencele kaj sen povo
ĝis ĝi ĉesas kirle krozi

kaj ariĝas por ripozi,
kuŝi kiel morta garbo
sub soleca seka arbo.

Historio de la Esperanto Movado en Miskolc 2009-2010



Miskolc – La Lignotabula kalvinana - preĝejo /Foto de fotisto de Urba Registaro de Miskolc/

Pri eventoj de la Miŝkolca esperantista kultura movado, ni donis anoncojn ĉiam, en numeroj de nia retrevuo. Tial nun ni aldonas ne ilian resumon, sed nur kompletigajn informojn pri la 2010a jaro.

La geedzoj Pásztor la 10-an de oktobro faris piecan vizitadon ankaŭ en tombejo de Máriabesnyő ĉe la kripto de familio-Vrangel, kie ripozas D-ro Kolomano Kalocsay. Ili faris aŭtunan purigadon ĉirkaŭ la kripto. Poste ili metis sian florkronon sub la memortabulo sur la muro. Fine ili ekbruligis la meĉujon, rememorinte je la elstara genia esperantisto.

La 17-an de oktobro 2010 la geedzoj Pásztor faris aŭtunan purigadon en la miŝkolca Avaŝ-monta reformata tombejo ĉirkaŭ la kripto de la familio Győry Nagy. Ili metis florkronon de „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo kaj ekbruligis meĉon, rememorante je la departementa Esperanto-Komitata prezidanto, D-ro Ludoviko Győry Nagy /li forpasis antaŭ 30 jaroj/. Li faris multe por tio, ke la esperanta lingvo estu akceptata kaj instruata en la bazaj kaj mezaj lernejoj.

La 18an de novembro 2010 la Societo de Tokajmontosubaj Artkreantoj (HAT), kaj Reta Societo de la Hungaraj Verkantoj (MAIT), aranĝis libroprezenton de sia antologio, en urbo Szerencs. En la antologio nun ankaŭ esperantlingve aperis rakonto, por reklami Esperanton. En la antologio Megbecsült Múlt (Aprezita Pasinto), la titolo de la aperinta rakonto estas: Macska bánat, Macska bú /Kata ĝojo, kata malgajeco/. La libroprezenton partoprenis ankaŭ sinjorino Anna Bartek (Anjo Amika), kiel reprezentantino de la Hungaria Esperanto-Asocio.



Parolas sinjoro d-ro Ernő Gaál.



Sinjinino Anna Bartek / Anjo Amika salutas la ĉeestantojn, nome de la Hungaria Esperanto-Asocio



Kun la antologioj enmane, la aŭtorino de esperantlingva rakonto: sinjinino Adri Földi, Pásztor videblas sur la bildo.



La rolantaj gimnaziaj gelernantoj.

La bildojn fotis sinjoro Stefano Bartek, edzo de Anjo Amika. Sendinto estis la HEA.

Lasta aranĝaĵo de la jaro estos; la florkronado de memortabulo de D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto en la strato Zamenhof la 15-an de decembro, de la 15a horo. Okaze de tio ni rememoros pri kreinto de Esperanto, D-ro L.L.Zamenhof. Tie la gepartoprenantoj deziros unu al alia agrablan kristnaskon kaj feliĉan novan jaron.

László Pásztor

Prezento de la antologio *Aprezita Pasinto*

Mi havis tre afablan inviton por partopreni la prezenton de la antologio *Aprezita Pasinto*, la 18an de novembro 2010, en la belega Kavalirĉambro de la Fortikaĵo en Szerencs.

La feston inaŭguris d-ro Ernesto Gaál, prezidanto de la VerkistaSocieto. Poste d-ro Ernesto Gaál petis min saluti la ĉeestantojn, nome de la estraro de Hungaria Esperanto-Asocio. Volonte mi plenumis tiun ĉi taskon.

Post mia saluto de la festantoj, la urbestro de la urbo Szerencs, faris vervan festparolon. Post la festparolo, la studentoj de la surloka gimnazio prezentis fragmentojn el la antologio, deklamante poemojn, laŭtlekante novelojn, kantante kelkajn kantojn. Ili havis grandegan sukceson.

En la antologio aperis en du lingvoj – hungare kaj esperante – unu verko de s-ino Adri Földi, Pásztor: Kata ĝojo, kata malgajeco.

Anna Bartek / Anjo Amika

Ni funebras

Sinjoro MAGYARI József (hungaro, emerita bankoficisto) naskita en Szigethalom, 02.09.1923, mortis en Salgótarján, 01.08.2010. Li instruis nian lingvon ekde 1954, estis D kaj FD de UEA, dufoje helpanto dum UK-oj, korespondis kun esperantistoj en kvaroncenton da landoj. Sciigis lia filo Tomaso

Imre Szabó – HEA

Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” esprimas sian kondolencon al la funebranta familio kaj senĝenan poreternan ripozon deziras al la mortinto.

Estimplene: Sinjorino Adrienne Pásztor

Intermonda Invado

Mi ankoraŭ memoras ĉion, kvazaŭ okazintus nur antaŭhieraaŭ. Flugantaj ŝipoj aperis je la rando de la ĉielo. Jam pli frue kelkaj ekvidis tiajn veturilojn proksime al nia Tero, sed oni ne kredis ilin. Oni pensis, ke ili estas frenezaj aŭ, ke ili volas nur alvoki la atenton pri si. Alia teorio asertis, ke la vidintaj “aĵoj” estas nur novtipaj veturiloj elpensitaj de nia militistaro. Sed ĉi foje multaj vidis tiun areton da veturiloj. Ili ŝvebis tute silente pere de nekonata tekniko. El unu el la grandaj aĵoj eliris eta kaj per tiu ili alteriĝis. Nia registaro decidis sendi diplomatojn sed ankaŭ soldatojn, ĉar ne eblis scii ĉu temas pri amikaj aŭ malamikaj estaĵoj. Niaj diplomatoj alproksimiĝis al la stranghaŭtaj uloj. Sed ili ne sukcesis komunikiĝi kun la alteriĝintoj. Nur per gestoj. Ĉar la sonoj, kiujn tiuj eligis estis nekompreneblaj. Iliaj vizaĝoj estis timigaj kaj ili havis pintan kapon. Neniu poste memoris kiel tio okazis, sed la aspekto de la estaĵoj timigis nian loĝantaron. Aliflanke eble ankaŭ ili ektimis de ni ĉar pli kaj pli granda scivolema tumulto venis al la loko de la alteriĝo. Ĉiukaze ial oni ekbatalis kaj tio okazis antaŭ ol nia registarestro havis tempon alveni. Aŭdinte pri la ekmilitado li ordonis, ke pliaj soldatoj iru tien. Sed niaj plej bonaj soldatoj eĉ per niaj plej modernaj armiloj povis fari nenion kontraŭ la aliuloj. Ĉar tiuj surhavis brilajn skafandrojn, kiuj protektis ilin. Ili povis de malproksime mortigi iun ajn. Dum la lastaj horoj de la batalo ili venigis grandegajn monstrojn helpe de kiuj ili pli rapide povis dispecigi nian armeon. Post tiu unua batalo sekvis pliaj, kaj ene de kelkaj monatoj la estaĵoj regis super la plej granda parto de nia Tero. Ni fariĝis sklavoj kaj devis laboregi en minejoj. La eksteruloj volis nur ekspluati nian Teron kaj sendi ties riĉaĵojn al sia mondo.

Tiel rakontis la maljuna sudamerika indiĝeno Atacahú pri la alveno de la hispanaj konkerantoj en sian vilaĝon dum la jaro 1499.

Thierry Salomon

Esperantigis László Pásztor

Hungarlandaj Ekskursoj

Füzér



(Wikipedio)

Tio estas somerumejtipa, tre ege viglan turisttrafikon havanta vilaĝo. Ĝi estiĝis sur unu el la plej varia, bela loko de montaro-Zemplén, kies alteco super marnivelo estas 370 metroj. Ĝia distanco estas de Miskolc sur landvojo 95 km-oj al nordoriento. Posedanto de la setlejo estis inter 1205 kaj 1209 guberniestro Bánk, bienadministranto de la forrtikaĵdepartemento-Abaúj. Li havis ankaŭ la fortikaĵon. Proksime de la vilaĝo altiĝas iu sola vulkandevena kruta montosupro, sur kiu troviĝas fortikaĵo de Füzér. Historioj de la setlejo kaj fortikaĵo strikte ligiĝas. La fortikaĵo estas nia unu el la plej frua fortikaĵo, kiu konstruiĝis antaŭ la mongola invado. Ĝi staris jam en 1235. La reĝo Andreo la 2-a aĉetis la fortikaĵon, ekde tio la fortikaĵo kaj la al ĝi apartenantoj vilaĝoj estis reĝaj posedaĵoj. La fortikaĵo kaj la setlejo havis multe da mastroj. Ekde la 16a jarcento la familioj Báthory, Nádasdy havis la fortikaĵon. La fortikaĵon hungara reĝo Stefano, la 5-a konstruigis en 1262-1263. Post la katastrofo ĉe Mohács, kiam oni kronis je reĝo Johanon Szapolyai, dum unu jaro oni gardis ĉi tie la hungaran kronon. Post malvenko de la liberecbatalo de Ferenc Rákóczi la 2-a la imperiestra armea estraro eksplodigis la fortikaĵon. Rezulte de tio la fortikaĵo perdis strategian gravecon. Ruinoj de la fortikaĵoj ankaŭ nun staras. En ĝia turo gotikajn detalojn montranta kapelo estas. El la fortikaĵo la turisto vidas tre ege belan panoramon al la ĉirkaŭaĵo. Tiun panoramon admiris en 1988 ankaŭ gepartoprenintoj de la Nordhungaria Esperanto-Renkontiĝo. La renkontiĝon organizis la forpasinta Barnabo Batta, eksprezidanto de Esperanto-klubo.

Esperantigis László Pásztor

Füzérradvány



(Wikipedio)

La setlejo situas de Miskolc sur landvojo je 89 km-oj. Oni menciis la nomon de la setlejo unue en la ĉarto en j. 1262 laŭ nomo Rodowan.

Radvány estis centro de la, al ĵupantereno de Sárospatak apartenanta reĝa posedaĵo. Dum la turkaj tempoj ĝia loĝantaro preskaŭ pereis. Dum la 17a jarcento la posedanta familio Károlyi loĝigis slovakojn kaj germanojn. Kaj la familioj Füzéry kaj Bagossy posedis ĉi tie bienojn ankaŭ dum la 19a jarcentoj. En ĝia parko /294 hektaroj/ staras la iama kastelo –Károlyi, kio konstruiĝis dum la 18a jarcento, poste oni alikonstruis en 1857 laŭ romantika stilo. Post la 2a mondmilito en la kastelo funkciis lerneja instruado-edukado por infanoj, kiuj suferis pro tuberkulozo kaj spinorgana malsano

Danco de Feinoj

Dum mia kvina jaraĝo la kokluŝo, poste dum mia oka jaro la frua forpaso de mia amata patro, sekvigis por mi infanaĝan astmon. La infankuracistoj vane provis helpi, ĉar neniuj kontraŭastma medikamento efikis. Fine en 1954, la kuracistoj - de la tiam burĝonanta socialisma infankuracado - decidis sendi min en infansanatorion por kuraci min ankaŭ per bona, pura aero. Al la nordhungaria urbo Sátoraljaujhely mi vojaĝis kune kun mia patrino per ordinara trajno, de tie per mallargtraka trajno ĝis la vilaĝo Füzérradvány. De la dezirita haltejo ni marŝis ses kilometrojn, grandparte inter du vicoj de piceoj por atingi la malaltajn domojn de la sanatorio. Tiuj dometoj servis tiutempe kiel observejo, kie la infanoj restis dum unu monato. De tie la kuracistoj nur tiam sendis la infanojn plu en la kastelon, se ili havis neniun infektan malsanon. Antaŭ la dua mondmilito, la malaltaj domoj estis loĝejoj por la servistaro de la kastelposedantoj. Sed kromaj servistoj loĝis ankaŭ en la vilaĝeto Füzérradvány, proksime al la kastelo.

En departemento Zemplén oni trovas la vilaĝon Füzérradvány, proksime al la fortikaĵo de Füzér. La plej gravan vidindaĵon de Füzérradvány: la vilaĝgrande starantan kastelon, konstruigis la terbienula familio Réthey en la 16a jarcento por sia kroma loĝloko kiel kompletigaĵon de la fortikaĵo de Füzér. Poste tiu bieno iĝis kaj ankaŭ restis posedaĵo de la grafa familio Károlyi dum kvar jarcentoj. La kastelo konstruiĝis en la 1850-aj jaroj, en romantika stilo, laŭ planoj de la hungara arkitekto Miklós Ybl / Ibl (1814-1891). Li estis unu el la plej grandaj reprezentantoj de la novrenesanca konstruado de la 19-jarcenta Eŭropo. Liaj plej gravaj verkoj estas la Operdomo de la hungara ĉefurbo, la Károlyi- kaj Festetics- (Karoĵi kaj Feŝtetiĉ) palacoj, la Kristina-urba flanko de la Reĝa palaco de Budapeŝto... La plej grandajn internajn transkonstruojn de la kastelo de Füzérradvány, poste planis Albert Pio Viena konstruisto, laŭ la mendo de László Károlyi. Inter 1898 kaj 1907 estis konstruitaj la internaj stuko-ornamaĵoj, la marmorkovraĵoj de la muroj. Same tiam oni enkonstruis la marmorbanejojn, la renesancajn kaj frubarokajn kamenojn skulptitajn per floroj kaj nudaj - ofte flugilaj, pufvangaj infanoj. La infansanatorio funkciis per lerneja instruado por kuraci, kaj samtempe ankaŭ eduki la spirorgan-malsanajn infanojn. Ekde 1952 ĉi tiu vilaĝgranda kastelo, ĉirkaŭata per 3000-arpenta parko kaj arbaro iĝis tera infanparadizo. Post la alveno de la infanoj, la hungaran lingvon kaj literaturon instruanta pedagogo konigis al la infanoj la sciindaĵojn pri la loko, por riĉigi iliajn konojn pri la patrolando, krom la hejma ordo en nia kastel-nejmo dum nia tiea restado. Ni bonvole ĉizis liajn informojn en nian cerbon kaj gardis ilin. Li estis vera, entuziasma patrioto...Tiu kastelo kun la floroj buntantaj ĉirkaŭ ĝi ĉiusezone en ĝiaj parkoj, la interarbaraj kampoj, arbaroj, montoj-valoj iĝis mia dua „Feinlando”. Ni la tie loĝantaj infanoj vere kredis, ke la ŝanco por vivi tie, estas iu admirinda donaco de la vivo por ni. Paŝante de la parko ĉirkaŭanta la kastelon, sur la perloŝtonera vojo ni povis surgrimpi la larĝan ŝtuparon, malfermi la brilan kuproklinkan grandan pordon, kaj poste paŝi en la kastelon. Tie ni atingis post la marmorplanka antaŭĉambro la konversaciejon, poste la manĝoĉambregon, la kuirejon, kaj la kamerojn. El la antaŭĉambro koridoro malfermiĝis al la vojoj kondukantaj al la lernoklasoj kaj la etaĝaj ejoj. Sur la etaĝo estis la ĉambregoj de la knaboj kaj aparte tiuj de la knabinoj kune kun la flankaj ejoj (banĉambroj, necesejoj ks.). En la knaba flanko estis ankaŭ la loĝejoj de la geinstruistoj, gekuracistoj, geflegistoj kaj la

direktorejo. La branĉoj de la dikaj grandaj platanoj – kiuj estas indiĝenaj arbospecioj en nia regiono Nordhungario – etendiĝis ĝis la etaĝaj fenestroj. Vintre, kiam la arboj nude ripozis, ni povis enrigardi ankaŭ en la proksiman malantaŭparkan arbaron. Sur la neĝa arbara grundo ni ofte vidis vulpopelatan leporon kaj konsiliĝantajn korvojn. Ĉiu ĉambra infanaro havis estron, /estron/ el ili mem, kiu devis zorgi pri la ordo. Sed ilia tasko estis ne nur postuli la ordon, sed ankaŭ rakonti fabelojn vespere antaŭ ekdormo kaj inspiri la komunan kantadon. Se la estro ne volis fabeli ĉiuvespere, li havis la rajton rakontigi ankaŭ aliulojn. Tie mi ellernis fari belajn kroĉitajn rubandojn el silkaj fadenoj. Tiujn mi donacis al tiuj knabinoj, kiuj diris belajn fabelojn anstataŭ mi. Estante mi la estrino de nia dormejo, la loĝantaro denove komencis postuli de mi novajn fabelojn. Kion fari se mi jam rakontis ĉiujn de mi konatajn? Mi komencis fabeli pri la arbaraj bestetoj, poste pri la feinoj kiuj dancas en belaj longaj roboj subĉiele majnokte, kaj la Luno per sia lumo arĝentigas iliajn hararojn. Miaj samĉambraninoj devote aŭskultis la fabelon, kaj dum la sekvinta nokto ili songis, ke ili estas feinoj. Post kelkaj tagoj ekiris susuro inter ili. Kiaj devas esti, kian senton devas havi la feinoj, dancante florkronite sur la densa herbejo? Ho, nur unufoje en sia vivo ili ege ŝatus havi tiun pacan, ĝojan senton. Kiam ili decidis pri ties provo, ili vokis min kun si. Unue mi neis, dirante ke niaj superuloj certe ne permesos nian planitan dancadon. Sed la sopiro estis tiel forta, ke ili diris, se mi ne iros, ili iros malgraŭ mia rifuzo, ĉar ili ne volas ellasi tion el sia vivo. Fine mi jesis, sed petis ilin, ke ili tutvestigu sin sub la nokta ĉemizo, por ke ili ne malvarmumu. Unu el la knabinoj parolis pri la plano al iuj knaboj, kaj tiuj decidis danci kune kun ni. Sed tiam iu knabino atentigis nin, ke knaboj ne povas esti feinoj. Al tiu iu alia knabo respondis, ke en la „Songo de somermeza nokto” verkita de la fama angla verkisto Shakespeare, la nomo de reĝo de la feinoj estas Oberon. La reĝo regas certe ne nur feinojn, sed en Feinlando certe vivas ankaŭ knaboj. Do, se ankaŭ ili estas loĝantoj de Feinlando, ankaŭ ili rajtas danci kune kun la feinoj. Tiel okazis, ke dum bela stelluma maja nokto tri knabinoj kun tri knaboj eliris eksteren el la kastelo. Tiam jam forfloris la majfloro kaj same la kastelapuda tuliparbo. La multnombraj flavaj primoloj kaj violoj plenigintaj la basenon de la iama fiŝlago same jam forfloris. La aeron plenigis odoroj de robinio, la blankombrelaj floroj de sambuko kaj la lilavestaĵaj siringoj. Kiam ni ekaŭdis kriadon de la turdoj:”Kio okazos nokte? Nu, nu!” Ni ĉiuj ses infanoj kunridis sekrete frustrante inter ni, kaj susure respondis duone en ni mem: „Belega feindanco okazos!” Kaj malfruvespere, kiam ekdormis jam – krom ni – ĉiuj infanoj, ni la ses infanoj /9-13 jaraj/ rapide kaŝe tutvestiĝis kaj eliris el la kastelo. Ni rapidis sur la antaŭ ĝi situantan densan, verdan herbejon. Unue ni staris sub la brila stela ĉielo, ĝue rigardante ties belecon. Poste ni prenis la manojn de unu la alia kaj mallaŭte ekkantis. Unue ni kantis infankantojn, poste ankaŭ popolkantojn pri la printempa naturo. Poste ni ankaŭ ekdancis. Unue ĉiuj kune, poste aparte knaboj kaj knabinoj. Fine denove kune. Dum nia dancado defalis de niaj kapoj la pli frue preparitaj florkronetoj el leontodoj. Sed, en nia kortuŝa vivĝojo ni ne rimarkis tion. Plenigis nin la sento de nia feineco, nia senĝena plezuro de la lun- kaj stelluma, varm-venta, trankvila, florodora nokto. Sur la longan hararon de la knabinoj la luno verŝis puran arĝenton, iliaj vizaĝoj same brilis. Ni estis tute ebriaj, ĉarmitaj. Tial, ni ne rimarkis, la dume ĉirkaŭ ni kolektiĝantajn, same plenvestitajn kuracistojn, instruistojn kaj flegistinojn. Ili ne interrompis nian kantadon, dancadon. Sed kiam ni haltis por iom ripozi, ili venis al ni kaj petis nin ĝentile fini nian amuzadon kaj reiri en niajn dormoĉambrojn, por ne vekti la dormantojn. La sekvatage ricevitaĵaj riproĉoj estis justaj, ĉar ni senpermeso amuziĝis nokte.

Tamen ni ĉiuj, la ses infanoj ankaŭ nun bona-sente rememoras nian tiaman feindancon dum nia dekmonata resaniga tempo en la arbarzonita kastelo de Füzérradvány. Certe, nek antaŭ la dua mondmilito, nek nuntempe en la 21a jc. povas multaj infanoj rakonti pri tio, ke ili povis aŭskulti pianokoncerton en kastel-halo /de la grafa familio Károlyi/ tenata de du ruĝmarmoraj spiralfarmaj kolonoj, kaj ke ili baniĝis en same ruĝmarmoraj bankuvoj kiel iam la grafinoj. Aŭ pri tio, ke ni infanoj el ĉiuj sociaj klasoj de la tiama hungara popolo povis varmiĝi en tia marmorkamena ĉambro, kies planko estis farita el flormotivaj pargetoj, aŭ pri tio, ke en la kastela diskutejo kaj sur la koridoraj muroj ili povis rigardi, kiel ni, remburitajn ursokapojn kaj cervajn, muflonajn kornarojn. Konsideru ankaŭ tiun unikaĵon, ke niajn ĉambrojn lumigis veneciaj kristallustroj, kaj en la manĝejo ni sidis ĉe tiuj tabloj, ĉe kiuj iam princoj, grafoj, baronoj nutris sin post la grandaj ĉasadoj. La tuta floraro de la granda naturo odoris al ni, la piceoj verdis al ni, la fringoj kaj kantantaj turdoj al ni montradis kontente siajn nestojn inter la arbobranĉoj kaj la sciuretoj manĝis niajn kuketojn, kiam ili saltis al niaj fenestroj. Dum la ekskursoj ni povis ekkoni la tutan vivularon de la tri mil arpentoj.

La tiama socialisma socia ordo tre saĝe prizorgis la kuracadon de la malsanaj infanoj, bone sciante, ke la futuron konstruanta nova generacio devas havi sanan junularon.

Originale verkis en Esperanto s-ino Adri Pásztor

Vizito en urbo Tiszafüred



La okulvitra virino estas s-ino Julianna Vas-Szegedi, la alia s-ino Adrienne Pásztor

La Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo” faris viziton en urbo Tszafüred la 27-an de oktobro 2010, kie iam famaj potfaristoj laboris, sed ankaŭ nun laboras. En la urbo nia akompanantino estis la aktiva esperantistino, s-ino Julianna Vas-Szegedi Farkas. Ŝi nun ne laboras, sed estas hejme apud sia 2-jaraĝa fileto dum tempo de GYES (ŝtata infanprizorga subvencio). Dume kiel gvidantino de fakrondo agadas en la „Bán Zsigmond” Kalvinana Bazlernejo. Antaŭ nasko ŝi instruis en la „Hámori András” faklernejo, sed tie jam oni ne plu dungas ŝin. Laŭ ŝia opinio en la urbeto estas granda senlaboreco. Instruistino Julianna Vas-Szegedi estas helpantino en la Esperanto- lingvoinstruada programo „Comenius” sub la egido de la Eŭropa Unio /EU/ en Nord-Hungario. El kvar landoj de EU /Hungario, Bulgario,

Francio, Pollando/ gelernantoj de kvar lernejoj partoprenis ĝin. Ŝiaj gelernantoj kaj gelernantoj el Bulgario, Francio kaj Pollando renkontiĝis ĉi-jare en Tiszafüred. La infanoj koncertis, vizitis vidindaĵojn de la regiono, kantadis kune kaj faris memoraĵojn unu al aliaj. La lasta stacio de la „Comenius”-programo estos en 2011 en la Pollanda Rybnik. Bonvolu rememori, ke en la pasinta jaro ni informis pri renkontiĝo de la sama „Comenius”-programo, dume geknaboj lernantaj Esperanton en la bazlernejo de Miskolc-Komlóstető de s-rino Stefano Fedor renkontiĝis kun gelernantoj de angla kaj germana urboj. La kostojn de la partoprenantoj en la programo kovris la budĝeto de EU. Celo de la programo estas, ke la infanoj povu viziti reciproke siajn patrujojn pere de alproprigo de Esperanto kaj ekkoni reciproke siajn kulturojn. Ili ligas amikecon kaj akiras neforgeseblajn travivaĵojn. Estas ankaŭ celo, ke multaj infanoj ekkonu la universalan kulturon.



La Muzeo de Tiszafüred - bildo de la hungara Vikipedio

Ŝi montris al ni la Muzeon „Kiss Pál” en iu malnova nobeldomo, kiu estas unu el la plej malnova muzea kolektaĵo de Hungario /1877/. La nomdonanto estis Kiss Pál /1809-1867/, generalo de la liberecbatalo de 1848-1849, kiu post la malvenko ekloĝis en Tiszafüred kaj tie estis entombigita. Lia tomboloko troveblas en tombejo de Tiszafüred /Őrvény-voja tombejo./ En la muzeo ni povis vidi la internon de malnova ĉambro, produktaĵojn de potfaristoj, popolartajn teksaĵojn, jungilojn /selojn/. Ni vidis malnovan ĉiovendejon, forĝistan, lignaĵistan metiejojn kaj ties ekipaĵojn.





Kaj nun kelkaj bildoj pri la urbaj vidindaĵoj



Bazlernejo



Parto de parko apud la landvojo



Gimnazio de Tiszafüred

Historio de Tiszafüred, fare de Julianna Vas-Szegedi estas legebla esperante sur la turisma retpaĝo de HEA: www.hungario.hu. Zsolt Farkas (Ĵolt Farkaŝ), edzo de Julianna Vas-Szegedi portis nin per aŭtomobilo al la metiejo de Emeriko Szűcs, potfarista majstro, kie ni povis admiri produktaĵojn de lia potfara arto kaj liajn bakfornojn.



Keramiaĵoj de la vizitita potfarista uzino

Fotis: Geedzj Pásztor

Bedaŭrinde la regionan potfaristan domon „Nyúzó Gáspár” ni povis vidi nur de ekstere, sed ni ricevis prospekton pri ĝi de la muzeo. Poste ni iris al bordo de rivero Tibisko, kie plezurigis nin la boska aŭtuna pejzaĝo.

Ni dankas al Julinjo Vas-Szegedi kaj ŝia edzo, ke ni povis ekkoni la iaman potfaristadon kaj kamparanan vivon de Tiszafüred kaj nunan vivon de la urbo.

László Pásztor

La 3-a Renkontiĝo; kadre de Comenius-programo 2009/11 en urbeto Tiszafüred, Hungario

**La ĉeftemo en Hungario estis: “La eŭropanoj – egalaj kaj diversaj”
- la 10-17a de oktobro 2010**

Dum la renkontiĝo kadre de la ĉefprogamo ni okupiĝis ankaŭ pri la naciaj simboloj de ĉiuj partneraj landoj. Ni eklernis la himnojn unu de la alia, nacilingve. Krome, kompreneble estis inter la programeroj vizito de la ĉefurbo, kie ni estis propraj gastoj de ministro, Mihaelo Varga, ĉi tiel ni povis rigardi la Parlamentejon kaj la hungarajn naciajn simbolojn. Tiu programero estis tre interesa por ĉiuj partoprenantoj, ja nur kelkaj hungaraj lernantoj estis pli antaŭe en tiu loko, ĉi tiel ne nur la eksterlandaj geamikoj ĝuis la belecon de nia belega Parlamentejo, sed ankaŭ la hungaraj partoprenantoj!



Preskaŭ ĉiutage (lunde, merkrede, ĵaŭde) ni havis 3-4x 45 minutajn studhorojn – kiuj dependis de la pacienco de la lernantoj. Se ili laciĝis, ni povis en la lerneja korto kune ludi – En tiuj studhoroj la lernantoj ludante lernis Esperante. Eĉ lunde ĉiu partoprenis hungarlingvan matematikan studhoron, kiam la instruistino instruis la 4-an klason kalkuli ne nur hungarlingve, sed ankaŭ Esperante.

Dum la lecihoroj daŭre ni povis eklerni la himnon de Pollando, Bulgario, Francio, Hungario. Kaj antaŭ la komuna kantado ni prezentis unu al la alia ankaŭ niajn naciajn simbolojn.

La renkontiĝo iom pli frue komenciĝis, ja la pola grupeto alvenis jam la 9an de oktobro, tiel ili povis pasigi iom da tempo sur la bordo de rivero Tisza (Tiso, Tibisko): **dimanĉe antaŭtagmeze**, kaj ili partoprenis la Sanktan Meson en la katolika preĝejo. Post tagmanĝo la pola kaj la hungara grupo ekiris al Budapeŝto, al flughaveno por atendi la francan grupon.

Post la alveno de la franca grupo, ni kune ekskursis al Akvomondo de Budapeŝto, kie ĉiu partoprenanto (ne nur la infanoj) tre bone amuziĝis, baniĝis ĝis nokto.

Lunde, la 11-an de oktobro 2010-a, ni havis lokajn programojn jam kune kun la bulgara grupo, kiuj intertempe aliĝis al la internacia grupo, antaŭtagmeze ni havis lecionojn en la kalvina bazlernejo „Bán Zsigmond”, posttagmeze ni kune ludis en la korto de la kalvina preĝejo, kie estis multege (plurcent) da kaŝitaj diverskoloraj steloj (el papero). La infanoj devis pli kaj pli multe ekttrovi, ĉar dum la vespera kunludo ili povis per tiuj „stelmono” pagi dum la ludo. Vespere ĉiuj povis montri kiel scias kalkuli dum la licit-ludo.

Marde, la 12-a de oktobro 2010-a: tuttaga ekskurso al Budapeŝto (ni rigardis la Parlaŭmentojn, sed antaŭe ni promenados en Buda-burgo (pro la tumulto de la programoj ni povis nur unu parton rigardi de la Burgo, la Fiŝkaptistan Bastionon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon).

Posttagmeze ni promenadis en la parto de Pest, ni vizitis ankaŭ la Placon Hősök.



Merkrede la 13-a de oktobro 2010-a : lokaj programoj en Tiszafüred.

Antaŭtagmeze: lecionoj en la lernejo, ni havos studhorojn, kaj niaj infanĝardenanoj prezentis sin. Al bazlernejo „Bán Zsigmond” apartenas ankaŭ infanĝardeno, kie „lernas” 3-6 jaraj infanetoj. Ili prezentis al ni infankantojn kaj ludojn , kiuj ligiĝas al aŭtuno.

Poste ni trapromenis al la urba juĝejo, situanta apud la lernejo, kie la ĉefjuĝistino prezentis al ni la konstruaĵon kaj la laboron, kion ili faras de tago al tago. La gastoj povis ankaŭ provi la „laborvestaĵojn” de la juĝisto, advokato.

Post la tagmanĝo ni iris al la urbestrino, kiu prezentis al la internacia grupo la urbon kaj respondis la demandojn de la gastoj.



La instruistino Julianna Vas-Szegedi vi vidas en la blua vestaĵo



Posttagmeze: ni ekskursis sur la rivero Tisza

Vespere: ni ĉiuj reiris al la lernejo kie estis ekspozicio de Infana Desegnokonkurso pri la temo „Realo kaj fantazio”. Entute 180 desegnaĵoj alvenis.

La plenkreskuloj kiuj estis scivolemaj pri István NEMERE, kiu estas fama verkisto kaj hungare, kaj esperante li verkas, do la interesiĝemuloj povis partopreni la unuhoran prelegon de Sro Nemere pri la temo „Realo kaj fantazio”. Laŭ la planoj ni estus ŝatintaj transdoni premion de la lokitoj de la desegnokonkurso, sed kelkaj partoprenantoj post la limdato sendis siajn desegnaĵojn, do la decido pri la lokitoj naskiĝis pli poste. (La rezulton oni povas legi en Juna Amiko)

Ĵaŭde, la 14-a de oktobro 2010-a:

antaŭtagmeze: ni vizitadis la lokan fajrobrigadejon kie la estro gvidis nin tra la konstruaĵo.

fru-posttagmeze: amuzaj sportprogramoj en la belega aŭtuna vetero, kie la sportemaj partneroj ricevis donacon: printitan T-ĉemizojn kaj skribilon de la lernejo.

Posttagmeze-vespere: mi ekskursis al urbo Debrecen, tra la fama vilaĝo, Hortobágy, kie estas la malnova 9-trua ŝtonponto. Hortobágy estas parto de la mondheredaĵoj kun siaj malnovaj historiaj ejoj kaj famaj bestoj.

En urbo Debrecen estas la belega akvoparko, kie ni povis amuziĝi tre bone - trihora programo-. Kiu ne ŝatis baniĝi, povis aĉetadi kaj promenadi en la urbo.

Vendrede, la 15-a de oktobro 2010-a:

Antaŭtagmeze ni partoprenis la aŭtunan festivalon de nia infanĝardeno, kie dum pli ol du foroj amuzigis nin la etuloj per diversaj kantoj, ludoj.

Vespere: festa/solena programo en nia lernejo. Lernantoj de nia lernejo (ne nur la esperanto-lernantoj) dancis, muzikis, amuzigis la publikon kune kun la gastoj, ja ĉiuj partneroj prezentis sin, ne nur la hungaraj infanoj.

Post la prezentado ni havis subĉielan (noktan) bivakfajron, kion sekvis mallonga dancado en la hotelo.

Sabato, la 16-a de okt: post la matenmanĝo la bulgara grupo ekveturis hejmen kaj aliaj vojaĝis al la proksima vilaĝo, Abádszalók, por rigardi la faman pupomuzeon.

Dimanĉo, la 17-a de okt: hejmenveturo de la (pola kaj) franca grupo.

Kompreneble en kelkajn paĝoj mi ne povis paroli pri ĉiuj programeroj, ja mi povus babili ankoraŭ pri la kunaj studhoroj, pri la teatraĵoj (ĉefe la bulgara teatraĵo plaĉia laŭ ni al ĉiuj plej bone) kion prezentis la lernantoj, la noktaj babiladoj inter la infanoj, ja ili en unu hoteleto, preskaŭ en la sama etaĝo loĝis dum la semajno..... Sed nia memoro gardis ankaŭ tiujn momentojn!

Ni esperas ke por ĉiuj partoprenantoj estis neforgesebla ĉi tiu semajno en Hungario, en nia bela urbeto, Tiszafüred. Kaj jam ni tre atendas la sekvan renkontiĝon en Pollando, en urbo Rybnik, kio okazos en majo, 2011!

Julianna Vas-Szegedi, Tiszafüred, Hungario

Revuo

Hungara Fervojistia Mondo

La revuon Hungara Fervojistia Mondo, fondita en 1957 de d-ro István Bácskai, mi konas ekde 1962. Mi ekkonis ĝin en mia eksa esperanto klubo, direktita de d-ro Ludoviko Györy Nagy. La revuon por donaci al nia eo-fakrondo, portis la al ni vizitantaj fervojistaj samideanoj: D-ro Stefano Bácskai, Stefano Temesi kaj Stefano Pál. La de mi pli frue nekonata revuo bonegan rigardon certigis por mi - la tiam novbakita esperantistino - en la mondliteraturon, la fervojistan vivon kaj la eblecojn pri la internaciaj turismaj terenoj. Ĝi baldaŭ ekvekis mian intereson. Ja ĝi estis tiutempe kaj ankaŭ nun altrange verkita eldonaĵo de la fervojistaj esperantistoj. Ĝin verkis lingvistoj, la plej elstaraj fervojistaj fakuloj, poetoj, verkistoj, reprezentantoj de la Monda-Turismo.

Kredu min karaj legantoj, ke ĉi eldonaĵo neniom perdis el sia rango dum la forpasintaj jaroj!

Ĉi revuo estas tio, kio meritas la manprenon, pro ĝia riĉa teksta kaj bilda harmonio. Ĝi same taŭgas por akiri novajn konojn, freŝigi la malnovajn, por lerni kaj amuziĝi. La membroj de la Fervojistia Esperanto-Asocio vojaĝis, vojaĝas en multaj landojn de nia Tero, tiel ili havas multegon da vojaĝinpresoj por dividi por la legantoj.

Mi ne povas montri ĉiun al mi plaĉajn artikolojn de la 54 jarkolektoj, ĉar tiu ne eblas. Sed mi povas rakonti al vi, pri la 2010. jaraj numeroj. Inter ili ni povas trovi artikolon ekzemple pri la esperantistaj medicinistoj (inter ili unuavice pri L.L.Zamenhof), Yumeiho-masaĝistoj, krom la laboroj de radioamatoroj, lernejoj lingvoinstruistoj kaj de aliaj fakuloj. Inter la aŭtoroj la pleje mi ŝatis artikolojn de István Gulyás, János Patay, d-ro Imre Ferenczy, d-ro József Halász, Jindrik Tomišek ... Mi mencias nun artikolon de Johano Patay, pri la poreterno forpasintaj hungaroj kiuj elstaraj figuroj estis de la hungara esperantistaro. Lia rememoro

estis grava, tre bela ago, je kiu estis jam granda bezono. Mi mencias ankaŭ la artikolon de Stefano Gulyás (ĉefredaktoro de la revuo Hungara Fervojista Mondo), pri la ordiplomita geedzoparo Cziboly, membroj de la Hungara Fervojista – Asocio. Inter ili Jozefo estas unu revizianto ankaŭ de nia retrevuo Nordhungaria Informo. Vi povas legi sube artikolon de István Gulyás. Mi proponas al vi karaj legantoj, serĉu, aĉetu, legu la revuon, ĉar ĝi tre bonas. Mi, kiel membro de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”, kaj kiel ĉefkunlaboranto de la retrevuo Nordhungaria Informo, GRATULAS; la ĉefredaktoron István Gulyás kaj sian ĉiun kunlaboranton pro siaj poresperanto kaj porkultura agado.

Sinjorino Adri Pásztor

Ordiplomita geedza paro

Malofte okazas, ke ambaŭ anoj de aktiva esperantista familio en la sama jaro ricevas oran diplomon. Anikó kaj Jozefo Cziboly konatiĝis kaj ekamiĝis en la jaro 1964 dum TEJO-kongreso en Amsterdam. Samjare okazis la geedziĝo, kies ceremonion partoprenis multaj eminentaj esperantistoj.

La teknika kaj Ekonomi-sciencia Universitato de Budapeŝt rekonis la dum 50-jaran altvaloran fakan agadon de Jozefo Cziboly kaj aljuĝis honordiplomon al li. Jozefo Cziboly naskiĝis en 1936 en urbo Nagykanizsa. Post la abiturienta ekzameno li daŭris sian studadon en la tiama Konstrua kaj Trafikteknika Universitato kaj en 1960 akiris inĝenieran diplomon. Post diplomiĝo li eklaboris, La Hungaraj Ŝtataj Fervojoj dungis lin ĉe la Pontokonstrua Estreco. Komence divers-deĵorloke li praktikis sian diplomon, specialan kvalifikon kaj post la ekzameno de la relvojdistrikta inĝeniero oni nomumis lin ŝtatefervoja inĝeniero. Kiel konstruafera vicestro li akiris multajn investad-realigajn spertojn pri konstruado kaj rekonstruado de fervojaj pontoj. Pli poste lo okupiĝis pri projekto de fervojaj profundboraĵaj putoj. Pli poste liaj ĉefaj taskoj estis la konstrua teknologio de fervojaj pontoj. Ekde 1969 li maldungiĝis kaj laboris de MÁV, kaj laboris ĉe Metropola Inĝeniera Akcia Kompanio kaj li laboris kiel direktanta planisto de diversaj profundkonstruaj temoj. Pli poste li plenumis projekt-revizoran postenon, eĉ li estis estro de laborprotektado de la firmao. Li partoprenis en la prilaboro de la preskriboj de laborprotektado por konstru-industrio. Komence de la 1980-aj jaroj li turniĝis al la temo de informadiko kaj okupiĝis pri la evoluigo de inĝenieraj softvaroj por solvi aktualajn taskojn. Paralele li plenumis ankaŭ la laborprotektadan postenon kiel justica specialisto ĝis loa emeritiĝo.

La gvidantaro de la Porinstruista Altlernejo de Baja rekonis la dumvivan, rezultoriĉan fakan laboron de Anikó Cziboly kaj honoris ŝin per ordiplomo. Anikó Cziboly naskiĝis en 1942 en la urbo Székesfehérvár. Post la elementa lernejo ŝi lernis en la Instruistkleriga Instituto de Baja kaj post la abituriento ŝi daŭrigis sian studadon en la Supera Ŝtata Pedagogia Altlernejo de Baja. Post la diplomiĝo ŝi instruis en diversaj elementaj lernejoj de la regiono Nagykovács. En 1964 ŝi edziniĝis, pro tio ŝi devis postlasi sian provincan laborejon, ja ŝi transloĝiĝis al sia edzo en Budapeŝt. Tiutempe ŝi ne sukcesis akiri pedagogian postenon en la ĉefurbo, pro tio ŝi laboris en diversaj kulturdomoj kiel estro de la marionet-ensemblo, pli poste kiel arta oficisto. En 1967 ŝi aliĝis kaj studis la fakulton de popolkleriga-biblioteko en la Pedagogia Altlernejo de Debrecen kaj ŝi diplomiĝis pri tiu ĉi fako. Poste ŝi daŭrigis la studadon en la biblioteka fakultato de Altlernejo en Eger, eĉ ŝi akiris plian diplomon per faka ŝtatekzameno. La Ĉefurba Biblioteko Szabó Ervin dungis ŝin kiel bibliotekisto de 1968, kie ŝi laboris en diversaj gravaj postenoj ĝis sia emeritiĝo. Ŝi organizis t.n. Migran Bibliotekon kaj t.n. Centran Provizan Servon, eĉ ŝi estis ĝia vicestro. En la fino de sia aktiva kariero ŝi laboris en la Lago-serva Fako kiel sekciestro. Ŝi emeritiĝis en 1999 kaj kiel emeritulo per speciala

kontrakto ŝi laboras kiel bibliotekisto en la biblioteko de la Hungara Belartista Universitato de Budapeŝt.

La estraro de la Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio, la hungara fervoĵista esperantistaro plenkore gratulas al Jozefo kaj Anikó Cziboly pro la rezultoj de ilia faka laboro kaj pro ilia ordiploma distingo.

István Gulyás

Marteno Forrai la pli juna Donaco de la reĝo

Ĉu estis, ĉu ne estis, foje vivis iu multe saĝa kaj riĉa reĝo. En sia palaco plurcent servistoj gvertis siajn ĉiujn dezirojn, en sia grandioza trezorejo senkalkuleble multaj oroj kaj diamantoj estis. Lia biblioteko enhavis la plej specialajn kaj plej valorajn librokolektaĵojn. La reĝo decidis gastigi siajn geamikojn kaj disĉiplojn. Pro tio alvokis siajn heroldulojn kaj mesaĝis, ke li aranĝas gastigadon, riĉe li donacos tiujn, kiuj helpis lin kun fideleco kaj scio. Sed la reĝo havis strangan peton, nome ĉiu kunportu puran akvon, ĉar lia cisterno krevis, la akvo elfluis kaj oni ne povas akiri akvon de aliloke. La herolduloj selumis la noblajn ĉevalojn kaj forgalopis el la palaco. Ili seninterrompe rajdadis tra montoj, valoj, urboj, vilaĝoj ĝis kiam enmanigis la invitilojn al ĉiu invitito. Estis disĉiploj, kiuj ekkomprenis la peton kaj lojale tuj ekiris per varĉaroj porti la akvon en siteloj, bareloj, potoj. Estis aliuloj, kiuj indignis pro la peto de la reĝo, demandante, kion pensas la reĝo pri si mem? Ĉu li ne havas sufiĉe multajn servistojn por kolekti la akvon? Sed tamen ankaŭ tiuj ekiris kaj portis po unu glason da akvo. Post kiam ili alvenis, ĉiuj enverŝis la kun si portitan akvon en la cisternon, transdonis la ujojn al la servistoj, kiuj deponis tion en la antaŭejo de la reĝa kortego. Kiam oni akompanis la gastojn en la palacon, ili staris kun malfermita buŝo pro la surprizo. La tabloj preskaŭ kadukis pro la abundo de la plej multflankaj, bongustaj manĝaĵoj, la plej bonkvalitaj vinoj de la mondo por plenŝtopi buŝojn. La gastoj laŭplaĉe povis manĝi, trinki ĝis hontosento, ili ne lasis sin peti. Post la vespermanĝo ili estis scivolaj: kiun donacon ili ricevos? Pro tio ili demande rigardis al la reĝo. La reĝo informis, ke jam okazis la prepariĝoj: morgaŭ antaŭ la ekiro hejmen ĉiu ricevos kaj povos kunporti la donacaĵojn. Alitage frumatene, kiam radioj de la Suno lumigos la antaŭejon de la reĝa kortego, estiĝis grandega miro. Oni plenmetis la ujojn de la gastoj kun oroj, diamantoj. La reĝo adiaŭis ilin kun la sekvaj vortoj: kiel vi mezuris la akvon, tiel mi mezuris la donacon. Poste ili ekiris hejmen el la reĝa kortego: iuj kun ĝojo, aliuloj honteme.

Se iu havas orelojn por aŭdi, aŭdu tion. La rakonto kion lernigas al ni? Ĉu eĉ ni estus similaj? Tiom dankemaj? Post multjara instruo ĉu iom kolerete ni realigus la peton de la instruisto? Ĉu eble ni ne plenumus tion? Ĉu firme ni efektivigos la peton de nia majstro-instruisto? Ni devas decidi, sed la decido okazu ĝustatempe!

(Kompilis: Mária Ballán,
Esperantigis László Pásztor



Edeno de muso. La bildon sendis: sinjoro Teodor Andreas el urbo Košice, Slovakio

Templo kaj Klostro de Karmelanoj en Miskolc

La lulilo de la Ordeno de Karmelanoj luliĝis sur la Monto Karmelo en Israelo. Ĝi devenas laŭ la historiistoj de profeto Elio, kiu defendis la veran kredon kaj vivis en la defenditaj grotoj de la montaro. Lian memoron konservas la grotoj kaj la fonto-Elio.

La grotoj de la Monto Karmelo taŭgis por doni restejojn por la kristanaj ermitoj, vivantaj malproksime de la mondo, kiuj nomis sin Fratoj de Beata Maria de Monto Karmelo. Ĝis la 12-13-aj jarcentoj elformiĝis organizitaj komunumoj, pro tio en jaro 1209 Sankta Alberto de Vercell eldonis por ili regularon en Accon.

La unuaj Karmelanoj alvenis al Hungarujo en jaro 1355, en 1372 ili konstruis klostron kaj kapelon por Ordeno de Beata Sankta Maria de Monto-Karmelo.

La Karmelanoj en Miŝkolc aperis en 1942, kie ili konstruis klostron kaj kapelon ĉe la nuna strato Kiss Ernő. En 1944 konstruiĝis la nova, sed ankoraŭ provizora templo, kiu estis konsekrita je la honoro de Sankta Terezia de Avila. „Malfermiĝis la kapelo kaj klostro, sed ĉi tio ankoraŭ ne sufiĉas. La laboro nun komenciĝas, eĉ ne nur laboroj de la Karmelanoj, sed ankaŭ tiu de gekreduloj. Ni donas, ili portas plu la pacon, trankviliĝon, la oferdonon, la preĝan vivon.” (Citaĵo el periodaĵo titolita „Silento de Karmelo” en 1942.)

Post la aresto de monaĥoj la kapelo kaj klostro funkciis kiel „filio”, kaj de tempo al tempo minacis malfunkciigo kaj de la kapelo kaj de la klostro. Sed kunlabore la reorganiziganta Ordeno Karmela kaj la kreduloj – el kiuj formiĝis la „Komunumo de Karmelanoj Vivanta en la Mondo” – rekonstruis la Monaĥejon en 1993, la templon en 1996.

Bedaŭrinde la nombro de la monaĥoj malpliĝis kaj nuntempe jam ne kapablas funkciigi la klostron. Pro tio nuntempe la Grekkatolika Eklezio funkcias kaj faras sian benatan agadon.

„Ni ne forlasas la Solulon en la tabernaklo de nia kapelo. Ni ĝoje ĉirkaŭprenas per niaj vivo, adoroj, psalmadoj.” (Citaĵo el periodaĵo titolita „Silento de Karmelo” en 1942.)

Malgranda komunumo Miskolc de la „Karmelanoj Vivantaj en la Mondo” laboradas por ĉi tiu celo. Ĝia prioro (la neklerika gvidanto) en Miskolc estis la esperantisto sinjoro Barnabo Batta ĝis lia forpaso en 2009. Honore ni rememoras lin.

(Monaĥino Jánosné Csombok, esperantigis László Pásztor)

La Monto Karmelo en Israelo

Al la temo apartenantan leteron de nia samideano Josef Shemer, mi prezentas al vi, kiel kulturano kunlaboron inter delegitoj de UEA. Jen, ĝuu liajn senditajn konojn pri la Monto Karmelo en Israelo:

„Kara Adri,

Jen lokoj en la Interreto, en kiuj aperas materialo pri la Monto KARMELO:

1. Artikolo el Vikipedio en Esperanto: http://eo.wikipedia.org/wiki/Monto_Karmel

2. Fotoj:

<http://images.google.com/images?hl=iw&tbs=isch:1&ei=ZCnLTOPKCsmI4gamy4jdDA&q=%D7%94%D7%A8+%D7%94%D7%9B%D7%A8%D7%9E%D7%9C&sa=N&start=20&ndsp=20>

3. La ĉapitro en la Biblio, kiu rakontas pri la okazintaĵoj de la profeto Elija ĉe la Monto Karmelo:

Hungare: <http://biblia.hit.hu/bible/21/1KG/18>

Esperante: <http://www.site-berea.com/c/sb/index.html>

4. Pri la Karmelanoj, en la hungara lingvo:

<http://hu.wikipedia.org/wiki/K%C3%A1rmelit%C3%A1k>

En Esperanto: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Karmelanoj>

5. Aldonaĵoj al la artikolo en Vikipedio:

La monto havas gravecon por la esploro de la prahistorio, ĉar en ĝi oni trovis restaĵojn de prahomoj en grottoj, el antaŭ 120,000 jaroj! En la grottoj tie oni trovis restaĵojn de la neandervalo homo kaj de Homo Sapiens.

6. En la Biblio aperas pliaj mencioj pri la Monto Karmelo, ĉefe kiel simbolo por fekunda loko.

" KARMELO" en la Biblio (Malnova Testamento):

Pro tio oni nomas Monto KARMELO, ĉar la signifo de tiu ĉi hebreolingva vorto estas "fekunda/fruktodona tero aŭ loko, kie kreskas fruktoj.", ja tiu ĉi monto estas verda dum la tuta jaro (malsame al la aliaj partoj de Israelio), en la Biblio tempo ĝi ricevis la nomon KARMELO.

La vorto KARMELO aperas 46 fojojn en la Malnova Testamento (Biblio). En kelkaj lokoj ĝi aperas ankaŭ en la signifo de fekunda, fruktodona tero, floranta kaj simile.

Jen tiuj mencioj en la Biblio:

1. "Via kapo sur vi estas kiel Karmel, kaj la harbukloj de via kapo kiel la purpura robo de la reĝo, falde kunligita."

{Citaĵo el la libro Alta Kanto de Salomono, ĉapitro 7}

2. "Ĝi forte ekfloros kaj triumfos, triumfos kaj kantos; la gloro de Lebanon estos donita al ĝi, la beleco de Karmel kaj Ŝaron; ili vidos la gloron de la Eternulo, la majeston de nia Dio."

{Citaĵo el la libro Jesaja, ĉapitro 35}

3. "La Eternulo ektondros el Cion kaj aŭdigos Sian voĉon el Jerusalem; kaj ekfunebros la paŝtejoj de la paŝtistoj, kaj sekiĝos la supro de Karmel."

{Citaĵo el la libro Amos, ĉapitro 1}

Ĉi tie la profeto Amos uzas la vorton KARMELO kiel metaforon por la punotaj altaj-riĉaj tavoloj de la israelia popolo. Estas interese, ke ĉi tie ne temas pri simpla fekundo, sed pri simbolado de riĉeco.

Estas interese, ke en kelkaj lokoj Zamenhof (kiu esperantigis la tutan Malnovan Testamenton) tradukis KARMELO-n al "fruktoĝardeno" kaj al "fruktodona", do tiam li tute ne menciis la originan vorton KARMELO.

Ekzemple, en la libro Jeremija, 2: "Kaj Mi venigis vin en landon fruktodonan", sed en la hebrea originalo aperas definitive la vorto KARMELO ("Mi venigis vin al la lando Karmel"). Ĉi tie LLZ preferis esperantigi ĝin je "fruktodona".

Plia ekzemplo: en la libro Jesaja, ĉapitro 10 aperas: "kaj ekstermos la majeston de lia arbaro kaj de lia fruktoĝardeno". En la hebrea originalo aperas la vorto KARMELO. ĉi tie LLZ preferis esperantigi ĝin je "fruktoĝardeno".

Rimarko: Zamenhof agis precize, kiel agis aliaj tradukantoj de la Biblio. Ankaŭ en la alilingvaj tradukoj la vorto Karmelo ne aperas en tiuj ĉi du kazoj.



Jen, statuo de profeto
Amike salutas,
Josef Shemer”

Pliaj leteroj el nia leterkesto

Brazilio - La birdeto

Motorciklisto veturis per 140 kilometra rapideco hore sur ŝoseo.

Subite birdeto aperis antaŭ li, kaj li ne sukcesis eviti la interfrapiĝon: "PUF!"

Per la retrospegulo, la veturanto ankoraŭ povis vidi la besteton turnantan sin plurfoje sur la ŝoseo, ĝis kiam ĝi ekkuŝis senmove.

Premita de mediprotekta konscienciproĉo, la veturanto haltigis la motorciklon kaj revenis por helpi la besteton, kiu estis senkonscia, preskaŭ mortinta.

Tre afliktita, la motorciklisto levis la etan akcidentiĝinton kaj portis ĝin al bestkuracejo, kie ĝi estis sukurata kaj savita.

La saviginto aĉetis kaĝon kaj portis la vunditon al sia hejmo. Li zorgis doni al ĝi pecon da pano kaj akvon.

Je la sekva tago la birdeto reakiris la plenan konscion. Vekiĝinte kaj vidinte sin malliberigite kaj ĉirkaŭite per krado kun peco da pano kaj vazo da akvo en la angulo, la besteto metis la flugiletojn sur la kapon kaj kriis maltrankvilege:


- Ho ve! Mi mortigis la motorcikliston!

Tre multan feliĉon al 2011 por vi kaj por la legantoj!

Josenilton <jotakaeme@gmail.com>

En la jaro 2010-a 20 jaras la muziko-grupo esperantista en la

Demokratia Kongo-Kinshasa



Esperantistajn retajn leterkontaktojn serĉante mi renkontiĝis kun nomo de sinjoro Viktor Lukolama Lufimpu, kiu loĝas en urbo Kinŝasa en la Demokratia Kongo. Li rakontis, ke li estras muziko-grupon, kiu ludas afrikan muzikon kaj kantas esperantlingve. Miajn demandojn koncerne la grupanojn kaj ilian muzikon, kaj je tiuj respondojn de sinjoro Viktor Lukolama Lufimpu, vi povas legi nun:

- Bonvolu paroli pri Vi estimata sinjoro, kaj pri via muziko-grupo

Mi estas Viktor Lufimpu el Bando Konga Espero.

Mi naskiĝis en LUKALA, la 27-an de julio 1961. Mi edziĝis la 19-an de decembo 2009 mia edzino nomiĝas Beatrice Kaba-Ase. Mi diplomiĝis en Kisangania Universitato en 1985 kiel agronom-inĝeniero. Nun mi estas komisaro en nia Nacia Polico, krome mia laboro, la muziko estas mia pasio. Mi realigis 3 muzikvideojn post la apero de nia albumeto KIU LINGVO? en AKRIKA KOMPILO eldonita de VINILKOSMO kaj ni nun serĉas DVD-eldoniston por eldoni ilin sur DVD.

VINILKOSMO ne faras tion (ĝi nur eldonas muzikon sur CD) Floréal Martorell povas nur proponi disvendi la videojn en Vinilkosmo-elŝutejo.

Mi nun esploras la eblecojn por DVD, tial mi kontaktas volontulojn kiujn interesas la afero kun la celo eldoni muzik-DVD-on ĉe eldonejo. Nia muziko estas ŝatata sed mankas eldonisto.

- Ĉu via grupo estas ŝtate rekonita?
 - **Nia grupo estas nova, ĝis nun la ŝtato ne konas nin, ni seĉas rimedojn**
 - Kiom da membroj havas entute via muziko-grupo?
 - **Nia muzik-grupo havas entute dek membrojn.**
 - Laŭnome kiuj estas la kantistoj kiuj kantas, kaj kiel nomiĝas tiuj, kiuj nur muzikas?
 - **Kiuj kantas kaj muzikas estas Viktor Lufimpu, Rock Tamba Denizo, Junior Ngangu, Nelly Masemi, Leonie Mputu.....**
 - Ĉu inter viaj grupanoj muzikas kaj kantas ankaŭ la ne muzikgrupano JoMo?
- Jomo ne muzikas kune kun ni. Li societiĝis kun aliaj amikoj en nia lando. En nia**

lando estas tri artistaj bandoj: Konga Espero, Vigla Muziko kaj Mayoma, krom JoMo.

- Kiam komencis via grupo sian agadon?
- Ni fondis la grupon nur post la Esperanto-seminario kiu okazis dum la lasta jaro 2009, gviditaj de Petrovic kaj Xosé. La unua homo estas serbo, tiama prezidanto de ILEI, kaj la dua estas hispano.

Nun kun mia amiko Flo, mi sendas al vi la ligilojn de niaj grupaj muzikoj, por ĝui ilin, eĉ ankaŭ por aĉeti niajn diskojn. Ja vi skribis, ke plaĉas al vi nia muziko.
vinilkosmo@esperanto.org <http://www.vinilkosmo-mp3.com> <http://www.vinilkosmo.com>
<http://cd1d.com/fr/structure/vinilkosmo-esperanto-muzik-prod> <http://vinilkosmo.ipernity.com>
<http://esperanto.com/users/vinilkosmo> <http://www.myspace.com/vinilkosmo>

Por informo mi sendas la vi la ligojn al la paĝoj de la Afrika Kompilo en kiu troviĝas la albumeto "Kiu Lingvo ? " de Konga Espero... la CD estas mendebla ĉe <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkl100&lng=e> La tuta Afrika Kompilo ankaŭ estas elŝutebla ĉe http://www.vinilkosmo-mp3.com/afrika-kompilo-c-74_152_153.html?language=eo Se vi volas elŝuti nur la albumeton 8 titolan "Kiu Lingvo ?" Iru http://www.vinilkosmo-mp3.com/lingvo-c-74_154_156.html Tie ankaŭ eblas aŭskulti fragmentojn. La disko enhavas libreton kun ĉiuj tekstoj kaj se vi deŝutas la muzikojn la tekstoj troviĝas ene de la muzikdosiero kiel metadatumoj... Por fini, ni restas je via dispono por pliaj informoj. Plej muzike salutas vinilkosmo@esperanto.org
<http://www.vinilkosmo-mp3.com>
<http://www.vinilkosmo.com>
<http://cd1d.com/fr/structure/vinilkosmo-esperanto-muzik-prod>
<http://vinilkosmo.ipernity.com>
<http://esperanto.com/users/vinilkosmo>
<http://www.myspace.com/vinilkosmo> /Le 30/07/2010 19:14,

Plej kore: Viktor Lukolama Lufimpu,
http://www.vinilkosmo-mp3.com/lingvo-c-74_154_156.html
Telefonaĵoj: +243817179919
+243896055966
Paperpoŝto: Viktor Lufimpu B.P 7598 Kin1 CILU
C/o Mampuya Diakiese Kinshasa DR Kongo
Hejmadreso: 70, avenue Yassa, Q Lokoro, C/Bumbu Kinshasa"

*Mi dankas la eblecon por nia bablita ret-kontakto, kaj gratulas la 20-jaran Muziko Grupon!
s-ino Adri Pásztor, el urbo Miskolc, Hungarujo.*

Rusio

Laŭ la bona movada tradicio festi ĉiujare decembre Zamenhof-feston, en urbo Jekaterinburg (ĉefurbo de Urala regiono de Rusio) kunvenas esperantistoj de ilia regiono por kune festi la Zamenhof-tagon. Ĉi-jara preparado al la festo jam komenciĝis. Ĉe la organizantoj aperis ideo lanĉi du konkursojn, ligitajn kun Z-tago kaj ili invitis la geesperantistojn aktive partopreni ilin!

1. "Letero al Ludoviko Zamenhof"

Tiun ĉi konkurson por partopreni ili invitis ĉiujn verkemulojn, ke aktivigu sian imagon, fantazion, kreemon kaj provu skribi leteron al aŭtoro de Esperanto!
Elektu mem, en kiu ĝenro ĝin verki: ĉu en proza, poezia, humura aŭ alia. Ankaŭ enhance leteroj povus esti variaj: eble la esperantistoj dezirus turni sin al la Majstro kun iu peto, aŭ rakonti al li pri iu interesa E-evento en urbo (lando) de la leterskribanto, aŭ komuniki, kial tiu ekŝatis kaj lernis la lingvon, eble tiu simple volus danki lin ktp.....

Limdato de sendo estis la 10-a de decembro 2010. La plej interesaj leteroj estos publikigitaj kaj aperos en E-paĝaro de ilia regiono. Aŭtoroj de tri la plej sukcesaj leteroj ricevos premiojn de la organiza komitato.

2. "Foto-konkurso Zamenhof kaj mi"

Se la esperantistoj ŝatas foti, se oni scipovas kapti kaj haltigi momentojn por la sukcesa foto-bildo, ili proponis nepre partopreni tiun ĉi konkurson de fotoj! La fotoj povus montri ne nur propran vidon de L.Zamenhof, sed ankaŭ prezenti sin mem la fotanto apude. Bonvenis fotoj koloraj kaj nigra-blankaj, seriozaj aŭ ŝercaj. Akcepteblis ankaŭ video-materialoj. La plej interesaj fotoj eniros la retan foto-albumon, dediĉitan al Z-tago kaj 3 fotoj elektitaj de ilia ĵurio, ricevos premiojn de la organiza komitato.

La kontribuadojn ili akceptis laŭ la jena adreso: zamenhof-konkurso@mail.ru

La kontribuadoj por la konkursoj estos bona okazo partopreni ilian aranĝon dum ĉi-jara Z-tago en Jekaterinburg, eĉ se iu mem ne povis veni kaj ĉeesti ĝin!

/Laŭ invitletero de la Organiza komitato de E-renkontiĝo en Jekaterinburg (Rusio), s-rino Adri Pásztor./

Gratulo

Ni gratulas al la nobla ideo por aranĝi la supre menciitan Zamenhof-tagan konkurson, aranĝaĵon. Organiza Komitato bonvolu akceptu niajn bondezirojn por la sennuba amuzado, al la tutkorpaj ĉeestantoj, kaj al partoprenantoj per siaj konkursaĵoj. Ni atendas la rakonton pri la evento kaj la premiitoj.

Multe da sukcesoj por vi ĉiuj!

Nome de E. A. R. „Király Lajos”: s-ino Adrienne Pásztor

Atenton!

Pro la 14a de februaro 2011-a okazonta okuloperacio kaj la ĝin sekvonta resaniĝ-tempo de la kunlaborantino de nia retrevuo: s-ino Adrienne Lászlóné Pásztor,
nia retrevuo aperos nur en marto de 2011. Ni petas vian komprenon kaj paciencon.

Ni dankas ankaŭ la ĉi-jaran reviziantan laboron de niaj korektantoj, kiuj faris nian retrevuon pli bona per ilia senegoisma publikinteresa agado. Kaj al ili, kaj al la karaj legantoj de la Nordhungaria Informo, ni deziras agrablajn jarfinajn festojn kaj pacan, senzorgan, feliĉan 2011-an jaron!

Membraro de la Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>